
Estimados socios:

El próximo día 30 de Enero, sábado, a las 19.30 horas en primera convocatoria, y a las 20.00 en segunda, se celebrará en el salón de actos del Liceo Madrileño de Esperanto, la Asamblea General Ordinaria, con el siguiente

ORDEN DEL DIA

- 1º Lectura y aprobación, si procede, del Acta anterior.
- 2º Presentación de Cuentas del ejercicio anterior.
- 3º Aprobación o desaprobarción de la gestión de la Junta Directiva.
- 4º Elección de cargos directivos.
- 5º Ruegos y preguntas.

NOVAJ KURSOJ: Komenciĝis novaj kursoj (elementaj kaj superaj) kies horaro estas:

Mardo kaj ĵaŭdo: 8.15 - 9.15 P-ro Aŭgusto

Lundo-Markredo-Vendredo: 7-8 kaj 8-9 P-ro J. Carlos

Nuevas Cuotas:

Según acuerdo de la Junta Directiva y de la Junta General Extraordinaria, se aprobaron las nuevas cuotas, que quedan de la siguiente forma:

- Socio de número: 100 pts. Mensuales.

- Socio Protector: 200 pts. "

Como podrán ver, se han elevado las cuotas de 50 a 100 pesetas, pues la subida del ~~precio~~ precio de nuestra revista y demás artículos necesarios para el funcionamiento de secretaría, hacían insostenible el mantenimiento de la anterior cuota.

Durante la próxima Junta General Ordinaria se informará de la compra de una máquina multicosista. Su precio ha sido de 150.000 pesetas. Se pretende amortizar rápidamente esta cifra mediante la edición de ejercicios y gramáticas propias, que serán vendidas en el Liceo.

Como resultado de estas compra, ha aparecido el presente boletín informativo. Gracias a él podrán observar la calidad de la máquina, además del abaratamiento de su coste.

BULTENO

IMPRESOS

Socio: _____

D./Da _____

Domicilio: _____

Madrid - _____



DIFUSION D. DE LA CULTURA


Remite:

LICEO MADRLENO DE ESPERANTO
C/ Atocha, 98
MADRID - 12

Sr. Cartero poner una X en la razón de la devolución

- Cambio de domicilio _____
- Persona desconocida
- Dirección equivocada _____
- Otras _____ ¿Cuál? _____

PAGU VIAN ABONON GUSTATEMPE !!!!!



ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

Februaro-Marto 1982

MADRIDA
ESPERANTO
LICEO

c/ Atocha, 98
Madrid - 12 Hispanio
Tel. -- 2308798

NOVAJ OJ

LA REGO HONORA PREZIDANTO DE LA SIMPOZIO

Sia Rega Moŝto D. Juan Carlos de Borbon, rego de Hispanio, akceptu esti Honora Prezidanto de la "Internacia Simpozio pri Sporto en la Moderna Socio" kiu, laŭ ĝenerala kono, okazos en Madrido ekde la 7^a ĝis la 11^a de Julio 1.982.

SUBVENCIO

La Ministerio pri Kulturo (kies ministrino Soledad Becerril apartenas al la Honora Komitato de la Simpozio) aprobis subvencion por Madrida Esperanto Liceo. La tuta kvanto estas 150000 pesetojn.

NOVAJ KURSOJ

La venonta 19^a de Aprilo, komenciĝos novaj kursoj en nia Liceo, kaj Elementaj kaj Superaj. Ni sugestas ke ĉiu membro de la Liceo, kiu ankoraŭ ne parolu bone nian internacian lingvon, aligu plibonigu sian E-an konon.

VOJAGO AL LOGROÑO

Dun la tagoj 9^a ĝis 12^a okazos en Logroño la "VI^a H.E.J.S. Tendaro". Ni veturos per automobiloj kaj kunportos tendojn. Se vi deziras veni kun ni, bonvolu paroli kun Miguel Anco.

DENOVE "NIA VOĈO" VOKAS

(ĉu en la dezerto)

Dum kelkaj monatoj "NIA VOĈO" silentis. Bedaŭrinde, de tempo al tempo ni trafas malfacilaĵojn, problemojn, kiuj, kiel eble plej bone ni klopodas solvi. Sed kion ni plej multe bedaŭras, estas la manko de kunlaboro, de kunlaborantoj.

Nia revuo (eĉ tiel modesta!), same kiel nia Liceo, estas por ni ĉiuj, kaj ĝi devas esti nia komuna laboro. Se vi deziras havi "voĉon" kaj Liceon, vi DEVAS helpi al ni. La grandaj agadoj estas kolektivaj taskoj, kiuj bezonas komunajn strebojn. Se vi sentas vin veraj esperantistoj, vi partoprenas ĉe komuna idealo, kies plenumado postulas komunan agon. Kun malmultaj streboj oni ne povas atingi grandajn objektivajn. Kaj ni estas MALMULTAJ en la Liceo. Pro tio niaj fortoj ne sufiĉas por realigi niajn multajn kaj altajn celojn. NI BEZONAS VIN ĈIUJN! Pro tio nia "voĉo" estas tiel malforta, tiel malcerta: NI BEZONAS VIAJN VOĈOJN!.

Ĉifoje, "NIA VOĈO", la voĉo de nia kaj via Liceo, estas helpkrio al viaj esperantistaj konsciencioj, alvoko al viaj plej intimaj sentoj de sindonema kunlaboro. Ni bezonas, ni devas, ni deziras tiom multe fari! Ni havas amason de taskoj por plenumi, ni havas grandajn projektojn por realigi..., sed NI ESTAS SOLAJ! Ni estas tro, tro malmultaj personoj, voĉoj, manoj, fortoj ĉe la Liceo.

Pro tio, ĉifoje, denove ni alvokas al vi, al vi mem, kiu legas tiujn vortojn en ĉitiu momento: ni bezonas vin, la Liceo bezonas vin, se vi ankoraŭ gardas en via animo sindoneman amon pri la Internacia Lingvo Esperanto, se vi estas sufiĉe malavara por oferi etan parton de via tempo, iom da via entuziasmo. Venu, venu al la Liceo, ni petas. Venu almenaŭ de tempo al tempo, almenaŭ ĉiun merkredon, almenaŭ unu aŭ du fojon monate, sed venu, denove kontaktu nin kaj vidu kiom da multajn entreprenojn ni povus realigi se vi alportas al "via" Liceo vian etan sableron.

Bonvolu, ĉifoje, ne malaŭskultu nian helpkrion, nian rektan kaj urgeman alvoko: REVENU AL LA LICEO, NI BEZONAS VIN!. Ne lasu, ke "NIA VOĈO" perdiĝu en la dezerto!.....

Jose F. Arroyo

VIA TENDARO DE H.E.J.S.
HISPANA ESPERANTA JUNULARA SEKCIO
DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Logroño: Paskon, 1.982

Kara amiko/ino,
Post la aranĝo de diversaj diskuttrondoj pri la nuna situacio de la junaj geesperantistoj en Hispanio, evidentigis granda entuziasmo inter la junuloj por revigligi la movadon kiel eble plej efike, brile kaj simpatie. Rilate al tio, ni skizos sekve la plej gravajn sugestojn kiuj devenis el la ĉi-jaraj renkontiĝoj de Elche (16^a - 22^a de Aprilo) kaj Bilbao (18^a - 21^a de Junio), kaj la Kongreso de Murcia (17^a - 22^a Julio).

Laŭ la diversaj opinioj, la unua paŝo farinda konsistas en aranĝi kaj alogan kaj fruktodonan kaj oportunan nacian tendaron por ke ĉiuj junaj esperantistoj povu interkonatiĝi persone, kaj interŝanĝi siajn konojn kaj spertojn. Post enketo por fiksi la plej taŭgan periodon kiam tiu tendaro estus celebrotata, la ĝenerala opinio estis, ke ĝi devus okazi dum la Sankta Semajno de la jaro 1.982. Oni deflankigis la Kristnaskon de 1.981 kiel plej bonan pro la malvarmo. La somero de 1.982 estis same deflankigita, kaŭze de la malfacileco kunigi la gejunulojn, kiuj kutimas profiti tiun sezonon por plenumi diversajn aktivaĵojn (vojaĝojn prokrastitajn, studo-temojn, amuziĝojn, ktp.). Ankaŭ la loko estis previdita, kaj oni elektis Logroño-n pro ĝia situacio kaj la tiea ekzisto de nova grupo de esperantistoj. En tiu senco, la samideanoj el Logroño Chorro kaj Vikario, same kiel la juna samideano Ana Maria Ranero sin oferis por agi laŭeble plej multe por ke la planita tendaro okazu.

Por la sukceso de la estonta tendaro oni bezonas sugestojn de la junularo H.E.J.S. (Hispana Esperanta Junulara Sekcio de Hispana Esperanto Federacio) devas resti faka sekcio de H.E.F. kun granda aŭtonomio, kaj subtenita de la gejunuloj. Sekve mi listos profitindajn ideojn, kaj oferojn kolektitajn en Elche, Bilbao kaj Murcia. Ili, inter aliaj, povus esti disvolvigitaj en Logroño.:

- La Bilbaa grupo ofera paroli pri la spertoj de kelkaj membroj en esperantistaj laborkampoj (Bulgario kaj Pollando).
- La Madrida grupo oferas: a) aranĝi bazan kaj perfektigan kurson de Esperanto dum la renkontiĝo? b) fari prelegon kun projekto de lumbildoj pri "Belaĵoj el la fendo".
- La grupo de Elche planas gvidi diskuttrondon pri "Kiel organizi junan Esperantan Movadon".
- Samideano el Alikante proponas aranĝi konkurson de fotografaĵoj rilate al la tendaro.
- La grupo de Barcelona proponas aranĝi konkurson de tablotenis.
- La grupo el Valencio sugestas: a) dediĉi unu vesperon al la lernado de esperantaj kantoj, kaj klopodi reeldoni la kanta-reton de H.E.J.S. b) fari kolokvon en Esperanto pri serĉado de la personoj plej taŭgaj por okupi strarajn postenojn de la Juna Sekcio. (Se eventuale estus kandidatoj por la renovigo de la estraro ili devus prezenti laborplanon kaj skizon de la metodologio plej taŭga por ampleksigi la horizonton de H.E.J.S.)

Ĝis tie ĉi estis skizita ebla maniero...

en la venonta tendaro de Logroño. Nun venas la momento ekkomen-
ci labori senpaŭze por atingi bonan rezulton de ĝi.

Tiu ĉi cirkulero estas sendata al multaj esperantistoj kaj sim-
patianoj. Ĝia celo estas peti novajn ideojn aldoneblajn al tiuj
antaŭe menciitaj. Ĉiu opinio estos konsiderata.

La tendaro devas esti agrabla periodo kiam same okazos amuzigaj
aktivaĵoj kaj interesigaj kolokvoj. Ĉiuj havos la oportunon par-
topreni ĉu per hispana ĉu per esperanta lingvoj. Sed kompreneble
estos rekomendinda la uzado de Esperanto al ĉiuj kiuj kapablas
almenaŭ balbuti ĝin, ĉar tio estas la unua paŝo por forlasi la
timon paroli kaj pretiĝi regi la lingvon.

Rilate al la scenejo de la tendaro, la organizantoj el Logroño
klopodas atingi aŭ kampadejon, aŭ universitatan restadejon aŭ
lernejon.

La partoprenantoj de la tendaro pagos en Logroño 150 ptjn kiel
simbolan kotizon de aliĝo. Tiu ĉi mono estos dediĉata al unu ko-
muna vespermanĝeto kaj al sendado de informantaj cirkuleroj al
Hispanio kaj eksterlando.

Fine, mi invitas vin ĉiujn kunlabori kaj skribi aldonante novajn
ideojn, sugestojn kaj nomojn de amikoj viaj kiuj eble estus in-
teresataj pri la tendaro.

Restas tute je via dispono,

M.A. Sancho Pardo

J.C. Ruiz Sierra

Akceptanto de ideoj kaj sugestoj:	M.A. Sancho Pardo Liceo Madrileño de Espto. Atocha, 98 Madrid-12 Tel. (91) 230 87 98
-----------------------------------	--

PARABEBUS

(Kisu al mi) Irana popolkanto

Ej bela knabin'
ĉi nokt' mi estas via gast'
mi restos apud vi
ke via lip' kunigos al mia lip'

Ej beja knabin'
la brilon de via rigard'
kaj vian larmon de la soleco
lunigos mia ĉi nura lastnokt'

Kisu al mi
kisu al mi
por la lasta fojo
"Hoda tora negaah dar" (Adiaŭ)
ke mi iras tra mia destin'

Nia printemp' estas pasita
pasitaj estas pasita

ke mi estas serĉante la destino
tra la tifon' kun la boatistoj.

Negrava la vivo
mi renkontiĝos miajn kamaradojn
faronta fajron ĉe la montaro
dum nigra nokt' mi vojaĝas
al la mallumvoj' mi pasos

Rigardu min
ej, mia flor'
ne tristploru pro mi

Kisu al mi
kisu al mi
por la lasta fojo
"Hoda tora negaah dar"
ke mi iras tra mia destin'.

Siamak, Giti kaj Raŭl

CERVANTES EN ESPERANTO

Elstaras inter la hispanaj verkistoj la vaste kaj tutmonde konata Miguel de Cervantes (1547-1616), des pli ke li estas aŭtoro de unu el la plej gravaj verkoj de tuthoma literaturo: "DON KIŤOTO". Tial ne estas stranga ke diversaj esperantistoj klopodis traduki lian verkaron, kaj plej ofte, la majstra "Don KiŤoto".

Bourlet, Vicent Inglada Ors (1879-1949) kaj Law faris la unuan provon traduki Don KiŤoto-n, kvankan nur tri ĉapitrojn, en 1906. (1). En 1909, en traduko de Frederic Pujulà i Valles (1877-1963), aperis la unua eldono de "Don KiŤoto en Barcelona". Ĉi traduko aperis denove en 1924 (2^a Eldono) kaj estas ankoraŭ havebla. Ĝi estas traduko de ĉapitroj 51 ĝis 55 de citita Don KiŤoto, 2^a parto. (2).

Victor O. de Allende, vaska pioniro, okupiĝis pri la traduko de "La sciemulo impertinenta" (noveleto intermetita en la KiŤoto, XXXIII-a ĉapitro) kaj li sukcesis aperigi nur parton de tiu ĉapitro en la revuo "NOVA SENTO". Kvankan oni povas legi "daŭrigota", laŭ ŝajne, ĝi neniam aperis kompleta. Li suskribis ankaŭ datojn de tiu traduko: aŭgusto kaj decembro 1911, en Bilbao (3).

Tiama Madrida Esperanto Grupo pretigis, en 1918, sub titolo "Justeco kaj Kompato", parta traduko, preskaŭ je la fino, de 42^a ĉapitro, 2^a parto, el Don KiŤoto de l' Manĉujo. Verŝajne, tiu traduko estas de Julio Mangada (5).

Julio Mangada Rosenörn (1877-1946) ankaŭ provis traduki tiun saman verkon kaj en 1927 aperigis lian "Don KiŤoto de la Manĉa", kvankan nur la antaŭparolon kaj unuan ĉapitron (6).

Pli provo traduki tiun verkon "Don KiŤoto" estis farita de Luis Hernandez Lahuerta (1906-1961) kaj ĝi aperis libroforme en 1955 sub titolo "La Malprudenta Scivolulo", kiu estas traduko de ĉapitroj 53 - 54 kaj koresponda parto de tiu novelo en la 55-a (7). Sed la morto interrompis liajn klopodojn kian li nur estis tradukinta la kvin unuajn ĉapitrojn (8). Alia informo klarigas, ke li "preskaŭ finis la taskon, sed li ne trovis mecenaton, kaj la flavigintaj paperaĵoj kuŝas en malnova ŝranko ĉe liaj familiaĵoj! Nur du ĉapitroj (ĉu partetoj?) povis esti eldonita: La aventuro de la galeruloj kaj La Malprudenta Scivolulo" (9).

Du sonetoj el la 40-a ĉapitro de Don KiŤoto de la Manĉo tradukis Francisco Azorin (1...-1975), kiu aperigis ilin en BOLETIN (10). Hindrik Jan Bulthuis (1865-1945) ŝajne tradukis komplete ĉiujn ĉapitrojn de Don KiŤoto, kies manuskripto troviĝas ĉe la Biblioteko Holder de Universala Esperanto-Asocio (11).

En BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio, aperigis Fernando de Diego siajn unuajn provojn pri traduko de Don KiŤoto; ili estis kelkaj altvaloraj poemoj el la antaŭparolo kaj ĉapitroj 27-a kaj 34-a (12).

En tiu sama numero de BOLETIN ankaŭ aperis poemo De Solisdán al Don KiŤoto de la Manĉa, tradukita de Julio Mangada kaj apartenanta al antaŭparolo de Don KiŤoto (13).

La jubilea 200-a BOLETIN aperigis Antaŭparolo al la eldono de La Malprudenta Scivolulo de Luis Hernandez. Ĝia unua redaktoro (14). Fine de 1975 legiĝis ke Fernando de Diego "ĵus finis, post plurjara, konscienca kaj skrupula laborado, la monumentan taskon doni al Esperantujo kompletan version de la monde hispana fama ĉefverko DON KIŤOTO DE LA MANCHA (15).

Novnaskita kultura kaj informa revuo HORIZONTO aperigis la unuan ĉapitron, tradukita de Fernando de Diego, kaj enkondukon, far Ines Gastón, sub titolo "Don Quijote de la Mancha en Esperanto".

La menciita revuo poste aperigis ĉapitron 42-an de la Dua Parto, ankaŭ en traduko de Fernando de Diego (17).

Kiam Don Quijote estis survoje al fina kompleta eldono, tiama Hispana Esperanta Junulara Sekcio proponis kaj malfermis konton, kies donacoj helpus financi ĝian eldonkoston (18).

Feliĉe, en 1977 aperis longo sopirata kompleta traduko de la La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha, far Fernando de Diego (19).

Sed ne nur Don Kiĉoto estas tradukita, ĉar ankaŭ aliaj ne tiel gravaj verk(et)oj aperis en la Internacia Lingvo. Julio Mangada Rosenörn pretigis la tradukon de du bonckzempĉaj noveloj kiuj aperis en 1927: Du Junaj Fraŭlinoj kaj Korneliino, kune eldonitaj ((20).

En traduko de Fernando de Diego aperis en Boletin poemon Al la tombomonumento de Felipe II en Sevilla (21).

Juan AZCUENAGA

Bibliografiaj Notoj

- (1) IVO LAPENA, ULRICH LINS, TAZIO CARLEVARO: Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo. Centro de Esploro kaj Dokumentado pro la Honda Lingvo-Problemo. Universala Esperanto-Asocio. London-Rotterdam, 1974, paĝo 212.
- (2) MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA: Don Kiĉoto en Barcelona. El la hispana traduko F. Pujulá i Vallès. Ellersiek and Borel. Berlin-Dresden, 1924. 55 paĝoj, 14 cm. Ĉapitroj 51-55 el Don Kiĉoto.
- (3) NOVA SENTO, esperanta gazeto de Bilbao, organo de la vaska esperantistaro. Bilbao, Novembro 1911, 3-a jaro, n-ro 28-a, paĝoj 3-6 kaj NOVA SENTO, esperanta gazeto de Bilbao, organo de ala vaska esperantistaro. Bilbao, Decembro 1911, 3-a jaro, n-ro 29-a, paĝoj 5-7.
- (4) MADRIDA ESPERANTO-GRUPO: Pri Cervantes kaj lia Fankonata Verko el Quijote. 1915
- (5) HISPANA ESPERANTISTO, ilustrita revuo monata, oficiala organo de Zamenhofa kaj Andaluziaj Federacioj. Madrido, Majo 1918, III-a jaro, n-ro XVII-a, paĝoj 67-68.
- (6) MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA: La Genia Kavaliro Don Kiĉoto de la Manĉe. El la hispana trad. J. Mangada Rosenörn. 1927. 51 paĝoj 16 1/2 cm. Rimarkoj pri la titolo de la verko, dediĉo, antaŭparolo, versaĵoj al la libro, k.c., kaj unu ĉapitro de la fama verko.
- (7) MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA: "La Malprudenta Scivolulo" El la Hispana trad. L. Hernandez Lahuerta. Valencia, 1955. 64 paĝoj, 20 cm. Ĉapitroj 33-34 el Don Kiĉoto.
- (8) LÉON COURTINAT: "Historio de Esperanto (Movado kaj Literaturo)" (1887-1960). III-a Volumo. Bellerive-sur-Allier, 1966, paĝoj 265.
- (9) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. Madrid, Septembro-December 1977, n° 225/224, paĝo 21.
- (10) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. Zaragoza, Novembro 1967, 2-a Epoko, I-a Jaro, n° 3 (139), paĝo 9.
- (11) ESPERANTO, revuo de Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam, Januaro 1964, 57-a jara, n° 693(1), paĝo 5.*
- (12) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. Zaragoza, Julio-Aŭgusto 1973, XI jaro, n-ro 62(198), paĝo 12-14.
- (13) BOLETIN, organo de Esperanto-Zaragoza, Julio-Aŭgusto 1973, XI-a jaro, n-ro 62(198), paĝo 21.
- (14) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio, Zaragoza, Nov.-Dec. 1973, XI-a jaro, n-ro 64(200), paĝo 4.

- (15) ENRIQUE NAVARRO RUBIO: "La unua mond-fama ĉef-verko hispana, jam en Esperanto, en BOLETIN", organo de Hispana Esperanto-Federacio. Zaragoza, Novembro-December 1975, XIII-a jaro, n-ro 75 (212), paĝo 12.
- (16) HORIZONTO. Zaragoza, marto-Aprilo 1976, I-a jaro, n-ro 2, paĝoj 39-41.
- (17) HORIZONTO. Zaragoza, Nov.-Dec. 1976, 1^a jaro, n^o 6, paĝoj 133-134.
- (18) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. Madrid, Marto-Aprilo 1977, n^o 220, paĝo 6.
- (19) MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA: "La Inĝenia Hidalgo Don Quijote de la Mancha". El la hispana trad. Fernando de Diego. Fundacion Esperanto. Zaragoza, 1977. 820 paĝoj. 25 cm. Ilust. de Gustavo Doré.
- (20) MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA: "Du Junaj Fraŭlinoj kaj Korneliino". El la hispana trad. Julio Mangada Rosenörn. 1927. 70 paĝoj. 19 cm. Du noveloj el la bonekzemplaj noveloj de la aŭtoro.
- (21) BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio. Zaragoza, Julio-Augusto 1973, XI-a jaro, n-ro 62(198), paĝo 12.

* Gi enhavas ĉiujn ĉapitrojn, do estas kompleta traduko kun 1.448 paĝoj. Gi estas manskribita. Ĝia titolo "Donkiĉoto de l' Manĉujo". (Laŭ informo ricevita de S-ro Stefan Mac Gill, direktoro de la Centra Oficejo de UEA.

-----oo0oo-----

DU POEMOJ POR INFANOJ

TIE ĈI KAJ TRANS LA MARO

Tie ĉi kaj trans la maro,
En Eŭropo kaj Afrik'
Sin komprenas la bestaro
Sama lingvo, sen komplik'.

Jen la katoj ĉiu loke
Sin komprenas per miau, miau
Kaj la hundoj reciproke
Per la lingvo de l'hau, hau.

Nur ni homoj ne komprenas
Homofraton, kiam li
El alia lando venas
Por viziti tien ĉi!.

Partoprenu la ideon
Pri la lingvo de l'esper!
Lernu, lernu Esperanton
Ĉie, ĉie sur la ter!

El Pollando
(Aŭtoro nekonata)

LULILKANTO

Mia bebo, mia bebo
mi kantas al vi
la lulilkanton
por ke vi dolĉe dormu.

Oh mia bebo!,
nur mia, nur mia!
Ĝam vi estas homo.
Kie vi troviĝas,
mia bebo?

Mi deziras al vi
ke vi restu ĉiam
mia bebo,
infaneto mia.

Kie vi troviĝas
mia bebo, bebo,
mia bebo infaneto
mia?

Adelaida

(lernantino de baza kurso)

KIAL MI ESTAS ESPERANTISTO?

Kial mi estas esperantisto? Kiom mi respondu al vi, fraŭlino Marja Bulski? Vi diris, mi havas karan koloron. Ĝi estas la verda koloro. Vi tuŝis veran punkton. Nun, kiam ni sidas en paco ĉi tie, kiam mi vidas multajn junajn homojn, kuir havas tiun senton al la verda koloro, kiun senton mi havas, mi pensas, mi ricevis belan donacon. Mi estas ne nur maljuna homo, sed ankaŭ malnova amiko de Esperanto. Vi demandis min, kial mi estas esperantisto? Nu, mi rakontas al vi veran historion... Mi ne estis malamiko de la lingvo, sed mi ne kredis pri ĝi. Mi estis juna, kiam mi aŭdis pri la lingvo internacia. En la alta lernejo mi havis amikon, kiu venis el Varsovio. Li rakontis pri knabo, kiu faris tian lingvon kaj li prezentis ĝin al la gimnaziaj amikoj. Infana ludo, mi pensis kaj mi diris tion al mia amiko. Li protestis. Ni malpacis. Mi diris: lingvo de unu homo ne estas lingvo, kiun la homoj akceptas. La tempo iris kaj iris. Mi ne vidis longe mian amikon.

En bela tago (mi jam estis oficiro, ne poŝt oficisto kaj mi havis du manojn kaj ne unu) mi vidis mian amikon sur la strato. Mi salutis lin. Li akceptis mian saluton. Ni haltis, konversaciis pri la vetero, pri la familio, pri la servo. Antaŭ ol li iris hejmen, li metis maldikan libron en mian manon. Kio ĝi estas? -- mi demandis. La lingvo internacia, pri kiu vi diris "infana ludo". Nu, la sama knabo faris ĝin kaj la homoj akceptis ĝin. Akceptu ankaŭ vi -- li diris kaj iris hejmen. Mi rigardis, legis kaj mi metis ĝin en la ŝrankon. Ĝi ne interesis min... Mia amiko servis en mia regimento kaj denove mi longe ne vidis lin. Sed..., sed venis malfacila kaj malfeliĉa tempo. Estis milito inter la rusoj kaj japanoj. El eŭropa Ruslando mi iris al la malproksima Mangurio. Ankaŭ mia amiko. Apud mia regimento kuŝis lia regimento. Ni militis, militis. En tiu tempo mi havas malbelajn bildojn en mia kapo, sed ankaŭ tiu tempo metis la verdan koloron en mian koron.

Venis tago, kiam la japanoj faris el multaj freŝaj, junaj rusoj tre silentajn homojn, kiuj restis tie sub la tero. Tiujn malmultajn, kiuj restis, la malamiko portis al Japanlando. Mia amiko kaj mi estis inter tiuj malmultaj soldatoj. Li havis gravan malsanon kaj mi...mi... Vi vidas, mi havas nur unu manon... Nu, tie, kiam ni havis la plej malfacilajn tagojn, japana kuracisto venis al ni. Li faris la kuracistan laboron ne malpli simpacie ĉe mi ol ĉe mia amiko, sed kiam lia rigardo tuŝis tiun malgrandan esperantan legolibron, kiun mia amiko portis el nialando, li montris grandan intereso al li. De tago al tago, kiam li venis, li longe restis ĉe la lito. Li parolis la germanan kaj la anglan lingvojn, ni parolis ne bone la franca lingvon. Nu, li ne komprenis nin kaj ni ne komprenis lin. Nur tion mi vidis, li ŝatas mian amikon pli ol min... Kaj venis la tago, kiam la kuracisto kun tri civilaj japanoj haltis ĉe la lito de mia amiko. La plej maljuna, la patro de la kuracisto, amike rigardis kaj donis la manon al li: "Ĉu vi estas esperantisto?" -- li demandis kaj kiam mia amiko jese respondis, mi vidis tion, kio tuŝis mian koron. La tri japanoj amike salutis lin kaj montris tian simpation, kiam ni malfeliĉaj militkaptitoj ne vidis ĝis nun ĉe la japanoj... Nu, de tiu tago mia amiko havis pli bonan humoron ol antaŭe kaj mi vidis, tiu kuracisto kaj tiuj japanoj venis de tempo al tempo al li ĝis la tago, kiam li jam ne havis forton kaj la malvarma tuŝo de la Granda Mano fermis liajn okulojn. Tiam mi vidis, ankaŭ la malamiko havas koron, se la homaj sentoj parolas... De la kuracisto mi ricevis la malgrandan legolibron de mia amiko kaj liaj japanaj amikoj venis ankaŭ al mia lito. Mi rakontis al vi veran historion. Tial mi

havas belan donacon hodiaŭ, kiam venis tempo, en kiu ankaŭ mi
 havas tian homan senton, kian havis tiuj japanoj. Ho, Esperanto
 estas ne nur lingvo, sed idealo, kiu portas pacon al la koro
 kaj kulturon al la kapo. Vera esperantisto sentas, la patrolan-
 do estas patra hejmo, la nacia kulturo estas la gepatroj. Li
 file amas ilin. Sed la vera esperantisto sentas ankaŭ tion, la
 mondo estas patrolando de la tuta homa familio, la diversaj k
 kulturoj estas la fratoj kaj li frate simpatias al ili. Tial
 mi sentas esperantisto, ĉar mi sentas min homo kaj mi vidas
 homfraton en la homo, ĉu li apartenas al mia nacio aŭ al nee
 mia nacio. Sen bajonetoj, sen kanonoj la homoj estas fratoj;
 kun bajonetoj, kun kanonoj ili ne estas homoj. Ĉu vi komprenas
 la rakonton de via maljuna rusa frato?

Julio Baghy
 (el "Leciono en la parko", de "La verda Koro")

-----ooOoo-----

ELEGIO DE JORGE MANRIQUE JE LA MORTO DE LIA PATRO

Viglu, koro letargia
 kaj meditu pri la sorto
 atendente
 kiel pasas vivo nia,
 kiel ŝtele venas morto
 silentante;
 kiel gojo forrapidas,
 kiel oni ĝin memoras
 kun kor-veo;
 kiel la imago vidas,
 ke, ol nuno, pli valoras
 la paseo.

Vidu kiel, en momento,
 nuno pasastuj pereas
 en mort-ondon;
 do, juĝante kun prudento
 ni rigardu jam pasea
 la estonto.
 Kiu pensas, ke, future,
 lentes pli la vivo lia,
 tro esperas,
 ĉar ekzisto laŭnature
 ĉie kaj en tempo ĉia
 efemerus.

Niaj vivoj estas fluoj
 finiĝanta en la maro
 morto-svene;
 Tien rekte kaj sen bruoj
 malaperas mobelaro
 senrevene.
 Tien iras fluoj famaj
 kun humilaj kaj kun mezaj
 al la feĉo;
 tie ĉiuj estas samaj:
 la subul' kun taskoj pezaj
 kaj la reĝo.

ALVOKO

La alvokoj de poetoj
 kaj de oratoroj vanaj
 ne tre ĝustas,
 ĉar, el ties vorto-retoj
 diroj fremdaj kaj paganaj
 strange ĝustas.
 Mi alvokas kun espero
 nur al tiu, kiu bonis
 super ĉio,
 kaj vivadis sur la tero,
 kaj la homoj ne rekonis
 Lin, la Dio.

Tra ĉi vivo ni alvenas
 la alian mondon transan,
 sendoloran,
 nur kondiĉe ke ni prenas
 vojon virtan, do bonŝancan
 kaj valoran.
 La naskiĝi nin delasas;
 poste ĝis la vivo-fino
 ni plu krozas;
 alvenante ni forpasas,
 kaj nur en la morto-sino
 ni ripozas.

Vivas ni la vivon bone,
 se al Dio ni konfidas
 sen zigzagoj.
 Fido diras nin admone,
 ke la transa mondo gvidas
 rektaj agoj.
 Eĉ la sankta Filo Dia
 malsupr-iris el ĉielo
 por nin havi,
 kaj al nasko, morto sia
 li submetis sin sur tero
 por nin savi.

Kiel funda falsaj estas
celoj, kiujn ni post-iras
persekutei
Eĉ dum ni en vivo nestas,
ili sin en perdon tiras
absolute.
Tempo ilin desfrakasas,
ilin en veindo stato
fordetruas,
ilin pereige ĉasas;
eĉ la gravon de magnato
fato skuas.

Kio iĝas bel'junula
kaj la ĉarmo kaj la blanko
de vizaĝo?
Kio iĝas bril'okula
kaj la ruĝo de la vango
dum oldaĝo?
La lerteco kaj rapido
kaj la forto; kiujn havas
la fru-jaraj,
turnas sin je la rigido
kaj la pezo, kiujn trafas
la griz-haraj.
Nu, la alta grand-sinjoro
kaj la kasto kaj la sango
de nobelo
pro ŝanĝiĝoj de la horo
povas vidi sin sen rango
sur ĉi tero.
Kelkaj pro kuraĝo-manko
la moŝtecon fali lasas
ĝisprofunde;
kelkaj kun malplena ŝranko
nekonvenaj taskon ĉasas
rangovunde.

Eĉ bonhavo la plej granda
dissolviĝas plej surprize,
ĉu ne vere?
Riĉo estas ne konstanta,
damo movas ĝin malice
kaj mistere.
Ŝi, Fortuno, kun kruelo
riĉon rulas per la rado
arbitr-amo.
Ŝi ne scias pri fidelo,
sin dediĉas al rulado
frivol-mane.

Eĉe se iam la prospero
sian mastron akompanas
ĝis la tombo,
pensu ankaŭ pri cetero:
nia kurta vivo manas,
estas trompo.
Sur ĉi tero la plezuro
kiun tento al ni sendas,
sin ekstermas,
sed transmonde la torturo
punodone nin atendas
kaj eternas.

La allogo kaj la ĝojo
de ĉi trompa viv-azilo
baldaŭ pasas,
kuras sur mallonga vojo,
Ĉar tuj Morto - la kaptilo-
nin frakasas.
Ve al ni! Ni ekrapidas
kaj senhalte iras, iras
kaj nin movas.
Kiam nin la ret'insidas,
kaj eskapi ni deziras,
ni ne povas.

Se ni havus la probablon
turni la vizaĝon nian
en plej belan,
kiel havas ni kapablon
aŭ ni fari koron pian
kaj anĝelan,
kia granda diligento
por mienon nian flegi
malaŭstere!
Dume mankus eĉ momento
por animon nian regi
virtociele.

Al iamaj reĝoj gloraj
- nin informas la kronikoo
kaj analo -
venis batoj tre rigoraj:
ilin trafis la tragiko
de Fatalo.
Ĉion Morto fine rastas;
eĉ la reĝon, eĉ la papon
tiar-portan.
Morto tiel same mastras
kiel kompatindan knabon
greg-eskortan.

Ni ne zorgu pri Tojanoj,
kies glorojn kaj afliktojn
ni ne spektis;
ni ne zorgu pri Romanoj,
kvankan ties manuskriptojn
ni kolektis.
Krome, kial ni scivolu
la epokon parte mitan,
tre antikvan?
Hieraaŭan ni memoru
same plene forgesitan
kaj relikvan.

Kie reĝo Don Johano?
Kio iĝis la infantoj
Aragonaj?
Kie ties akompano
kaj la multaj junaj dandoj
bril-imponaj?
Ĉu ne estis nura ombro,
en festeno,
la turniroj kaj la pompo
kaj la helmoj kaj ĉevaloj
en areno?

(daŭrigota)

LITERO AL LA MASTROJ DE LA MONDO

Sinjoroj,

Ni estas... me ne scias kiom da milionoj da homoj. Ni devenas de ĉie ajn. Ni, preter ĉio, havas pasion+la vivon. Ni kumportas, pendita al nia animo, universon el grandaj kaj retaj amoj. En la tumulto de la urbegoj, bruozaj, nigritaj de la fumo, plenplenaj je lumaj reklamoj, kvankam neniu kredas ĝin, koroj kiuj batas; koroj, kiuj povas generi aliajn korojn, kaj aliaj, kaj aliaj... Ĉu vi eble scias, kio estas koro? Ĉu vi iam rimarkis diversecon de sonoj, kiujn ĝi eligas?... Faru ĝi kaj vi ja lernos ami fajron, venton survizage, la unuan ekstremigon kiam du korpoj unigitaj tuŝas la vualon de la ĉielo, liberecon, tion pri kio vi konstruas amasojn da teorioj, kiuj trompas plu nenion, ĉar ni ĉiuj scias, ke por esti libera necesas ami la vivon, kaj ni volas forigi ĝin, vi, mastroj de la mondo, gardistoj de la mondopaco. Vi estas semantaj timegon en niaj kerno, minacante nin per via neŭtronbombo, kiu detruas ne objektojn, sed personojn. Kia ironio de via progreso! Imagu: amasetojn da cindro apud maŝinoj, kiuj ne ĉesos funkcii, kiam via mortiga manaĵo elfalos sur niajn kapojn; kriojn, kiuj ne povos eliri el la gorĝoj; sangon, kiu ne estas verŝata sur viajn kontraŭatomajn ŝirmejojn; silenton, silenton; morton.... Ĉu vi eĉ ne aŭskultas la ululadojn de la morto?....

Sed, ho, mastroj de la mondo, kreintoj de tio, kion ni nomas civilizacio, foje vi estas tiel spritaj, ke ni krevas pro rido, kiam vi elĵetas tra via buŝo stultaĵojn kiel jena: "Por atingi pacon, pretigu por milito". Kaj tion vi diras tiel trankvile kaj vi ne hontas. Rimarku! Pligrandiĝos via nazo se vi daŭrigas akuŝante sensencaĵojn.

Malstreĉado, interkonsento de la du blokoj, persvadi per atomarmilo por atingi pacon...., bagateloj!. Ni diras al vi, ke oni nur konstruas pacon detruante ĉion, kio servas por mortigi, forigante landlimoj, farante ke la eltrovoj de la homa menso utilu al ĉiuj. Tio estas paco. Paco estas tio, ke iu ne mortu pro malsato, ke neniu komercu per la svito de la aliaj, ke malaperu nek arboj nek bestoj, ke ni profunde povu spiri kaj bani niajn nudajn korpojn en la maro kaj ami kaj tuŝi ĉiun matenruĝon kun la pintoj de niaj fingroj. Tio estas paco, mastroj de la mondo.

Finfine-petego: Forgesu nin iomete; interparolu, prelegu, ridetu aŭ ploru, batalu inter vi. Dume, la abeloj povos flirti super la dormantaj infanoj por surmeti guton de mielo sur iliajn lipoj; la maljunuloj, sidantaj apud la fajrejo, serĉos varmon, ĉiam varmon... Sed..., silentu! La homaro dormas en sia nesto kaj renaskiĝos en ĉiu ektagiĝo....



Miguel Fernandez

KELKAJ KONSILOJ PRI STILO

Oni povas diri, ke "stilo" estas arto bele kaj klare skribi aŭ paroli. Eĉ rekte uzante la gramatikajn regulojn, ne ĉiam ni atingas bonan stilon. Ĝi povas ŝajni facila tasko, sed ne estas tiel facile verki bonstilan frazon, belsonajn kaj klare kompreneblajn tekstojn. Multfoje ni trafas ideojn, kies esprimoformo povas rezulti iom komplika, precipe kiam ni verkas artikolon aŭ preparas prelegon. La ora regulo "parolu simple", ne ĉiam sufiĉas por belestila verkado aŭ parolado. La tro simpla uzado de la lingvo povas esti sufiĉe klara, sed ĝi ankaŭ povas esti iomete teda kaj senkolora, aŭ monotona kaj ripetema.

Por helpi vin iom scii, kio povas esti bona aŭ malbona stilo, ni elektis kelkajn ekzemplajn el la libro "NE TIEL, SED TIEL ĈI" verkita de F. Faulhaber, kiun ni esperas esti utila por studo kaj analizo.

BONA STILO ESTAS BONSONA. Se eble, evitu do tiajn interpŝigojn de-sonoj, kiaj ofendas niajn orelojn, malfaciligas la elparolon, kaŭzas malklarecon aŭ ebligas miskomprenon, ekz.:

NE TIEL

lingvekzerco
provflugo
manĝaĵzorgo
ovforma
sorĉŝanĝi
venĝsento

...SED TIEL ĈI.

lingva ekzerco
provoflugo
zorgo pri manĝaĵo
ovforma
sorĉe ŝanĝi
venĝosento

Ne en ĉiuj kazoj tiaj kolizioj de sonoj estas eviteblaj, sed oni klopodu kiel eble plej multe eviti ilin.

Ripetiĝoj.

Same malbele sonas en kelklinia spaco la ripetiĝo de iu sono aŭ vorto, ekz.:

NE TIEL

La lulilo iĝis por ŝi konsolo;
por ŝi ĝi ne estis senviva objekto:
por ŝi ĝi havis animon kaj vivon.

...SED TIEL ĈI.

La lulilo iĝis por ŝi konsolo;
por ŝi ĝi ne estis senviva objekto,
sed havas animon kaj vivon.

Legu laŭte ĉi suban tekston en kolono A. Kovru kolonon B kaj klopodu korekti la tekston A tiel, ke ĝi ne tro malfacigas la elparolon:

A. NE TIEL

Ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj, ĝis ĉio komencis turniĝi ĉirkaŭ ŝi kaj ŝi ŝanceliĝante serĉia apogon. La maljuna virino kaptis ŝin ĝustatempe kaj sidiĝis ŝin sur seĝo.

...SED TIEL ĈI

B.

Ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj, ĝis kiam ŝi ek-sentis kapturiniĝon; ŝanceliĝante, ŝi serĉis apogon. Ĝustatempe la maljuna virino ŝin kaptis kaj sidiĝis sur seĝo.

A. NE TIEL

Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj; li glutis por reteni ilin; li mordis sin sur sia lipo, li pugnigis siajn manojn en siaj pantalonpoŝoj; li kuntiris siajn piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.

... SED TIEL ĈI

B.

(liaj, siaj): Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj kaj glutis por reteni ilin. Li mordis la lipojn, pugnigis la manojn en la poŝoj de sia pantalone kaj kuntiris la piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.


(daŭrigota)

Nia Vöçö

organo de madrida esperanto liceo

Aprilo - Majo 1982

Ap 4j-82



MADRIDA
ESPERANTO
LICEO

TEL. 230 8798

C/ATOCHA, 98-4º
MADRID - 12
HISPANIO



ESPERANTO - OAZO

Kampadejo por ferio kaj
praktiki esperanton

KLARIGOJ POR ATINGI LA E-O

- 1- Gandía. 2- Eniru la vojon al vilaĝo Barig.
- 3- Eniru maldekstran disvojiĝon 5 Km for de Gandía.
- 4- Vojoforko. Iru maldekstren.
- 5- Disvojiĝo. Iru maldekstren.
- 6- Disvojiĝo. Iru dekstren.
- 7- E-O

Malfermita tutjara



La E-O situas en hispana oranĝe-
giano, 10 Km for de la strando
de Gandía (Valencia). Varma akva
spartejo, kahelita naĝejo (6x12)

Prezoj (1 nokto): 100 p/persono
(50 p/infano aŭ senlaborulo);
100 p/tendo, ruldomo, aŭto.

POSTADRESO: Akiles Sanz / Apartado 171
Gandía (Valencia) - HISPANIO



ESPERANTO - OAZO

Kampadejo por ferio kaj
praktiki esperanton

KLARIGOJ POR ATINGI LA E-O

- 1- Gandía. 2- Eniru la vojon al vilaĝo Barig.
- 3- Eniru maldekstran disvojiĝon 5 Km for de Gandía.
- 4- Vojoforko. Iru maldekstren.
- 5- Disvojiĝo. Iru maldekstren.
- 6- Disvojiĝo. Iru dekstren.
- 7- E-O.

Malfermita tutjara



La E-O situas en hispana oranĝe-
giano, 10 Km for de la strando
de Gandía (Valencia). Varma akva
spartejo, kahelita naĝejo (6x12)

Prezoj (1 nokto): 100 p/persono
(50 p/infano aŭ senlaborulo);
100 p/tendo, ruldomo, aŭto.

POSTADRESO: Akiles Sanz / Apartado 171
Gandía (Valencia) - HISPANIO

BEDAURINDE...

Jes, certe, bedaŭrinde... Ekde la lasta numero de nia malgranda sed bonvolema revueto NIA VOĈO, en kiu mi tiel kore vokadis al VI CIUJ, karaj geamikoj, karaj samideanoj, karaj liceanoj, tute certe ŝajnas, ke la voĉo de nia Liceo daŭrigas perdiĝinta en la plej trista dezerto de via indiferenteco... Kaj tio estas ege bedaŭrinde!

Kiuj inter vi ĉiuj atente legis nian revuon? Kiuj inter vi ĉiuj havas sinceran amon kaj intereson pri nia Liceo kaj ĝiaj aktivajtoj? Kiuj inter vi ĉiuj sentis en sia koro mian vokadon kaj decidis viziti nin almenaŭ iun tagon? Ĉu vi?... Ne, vi ne estis, vi ne venis. Aŭ, ĉu eble vi?... Ne, ankaŭ vi ne venis... Kaj mi dezirus scii: KIAL?

Jes, kial preskaŭ NENIU el vi deziras iomete kunlabori, veni de tempo al tempo ĉi tie kaj partopreni la vivon de nia Liceo? Kial preskaŭ neniu el vi povas esti tiel sindonema por alporti malgrandetan parton de sia tempo, cele revigligi la langvorema vivo de nia centro? Kial tiel multaj el vi perdis sian intereson por perfektigi, praktiki kaj iamaniere disvastigi nian universalan lingvon Esperanton?... Kaj, tiel, multaj aliaj KIALOJ, kies respondon ni volus koni, por klopodi trovi la taŭgan solvon.

Ĉu la kaŭzo estas via tempomanko?. Certe, la tempo mankas al ni ĉiuj! Tamen, ĉu vere vi estas tiel malriĉa da tempo, ke vi eĉ ne povas oferi almenaŭ duonhoron por veni ĉi tie kaj paroli kun ni, iun merkredon vespere? Ĉu la kaŭzo estas ke, laŭ via opinio, nia Liceo ne bone funkcias? Do, bone!: venu ĉi tie iun merkredon vespere kaj alportu viajn kritikojn kaj viajn proponojn! Ni parolos pri viaj ideoj! Ĉu la motivo estas, ke vi iomete forgesis vian sciigon je la lingvo? Do, bone!: nun vi povas vidi, ke ni havas multajn diversnivelajn kursojn. Venu kaj kompletigu vian perfektigadon de la lingvo!... Aŭ, ĉu eble vi pensas, ke ne estas loko por vi en la Liceo, ke vi povos fari nenion ĉi tie? Ne, tute ne! Vi eraras: ni BEZONAS vin! Venu ĉi tien iun merkredon kaj vi vidos kiom multe vi povos fari! Ni ĉiuj kune multe povas fari. Sed, bedaŭrinde, ki el mi diris al vi en la antaŭa numero, NI ESTAS SOLAJ! Ni ne havas sufiĉe da kunlaboraĵojn nek kunlaborantojn, Ekzemple: la teatrogrupo, la ĥoro, la muzikgrupo, la agrabla kaj amika etoso ĉe nia Liceo, la multaj interesaj aktivajtoj, kiujn ni povus entrepreni, kia maniere ĉu ni povus fari ilin sen via helpo, sen via kunlaboro? Ĉiuj la homaj aktivajtoj celante la komunan kaj kolektivan bonon kaj feliĉon de la homaro, nepre bezonas esti faritaj kolektivmaniere, kun frata kaj sindonema kunlaboro, kun amo kaj fido en la celita ideo. Kaj ĝuste tio estas Esperanto!

Kaj ĝi estas nur pro tio, ke ni estas tiel tristaj vidante, ke niaj voĉoj sin perdas en la senkorema silento de via indiferenteco... Kaj tio estas tre, tre BEDAURINDA!...

Ĉu almenaŭ vi, aŭdos ĉifoje nian voĉon? BONVOLU!

José F. Arroyo

PARTOPRENU EN LA MADRIDA SEMINARIO!

"Por ke la lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia!"

La supra devizo de Zamenhof fundamente difinas la celon de tuta strebado por Esperanto.

Fakte, ni volas, ke la lingvo internacia ne estu nur sekreta kodo de malgranda rondo de iniculoj, sed ke ĝi fariĝu praktike aplikata en ĉiuj kampoj de la moderna ĉiutaga internacia vivo.

Ĝuste tial, estas nun organizata en Madrido, en kunligo kun la Mondaj Futbalaj Ĉampion-ludoj, Internacia Sporta Seminario, kiu instigos la utiligadon de Esperanto je faka nivelo kaj en kampo de universalaj intereso kaj utileco.

Por si mem, la Seminario signifos la plej konvinkigan elmontron de la taŭgeco de la internacia lingvo kaj pruvos ties disvastigon. La prestiĝo de la Sporta Seminario estos des pli granda, ke la Reĝo mem de Hispanio, Juan Carlos I, akceptis la prezidantecon de la Honora Komitato, al kiu ankaŭ aliĝis du Ministroj kaj eminentaj reprezentantoj de la hispana publika vivo.

La diskut-programo atingos kontentige altan stadion, ĉar estas antaŭvidite, ke konataj esperantistaj fakuloj el Hispanio kaj el eksterlando, kiel Prof-ino Rafaela Urueña kaj Prof. Richard Wood, enkondukos la sesiojn, kiuj pritraktos la seminarian temon sub medicina, sociologia, historia, lingva kaj aliaj aspektoj.

Aparte de la diskut-kunvenoj, kiuj okazos nur matene, la programo proponos tre riĉan serion da posttagmezaj ekskursoj, vesperaj artaj kaj distraĵaj aranĝoj kaj festaj kunestadoj, en kiuj Esperanto ludos sian kutiman fratigan rolon.

Kiel oni povas rimarki, entute la Sporta Seminario celas plenumi tri celojn:

1. pruvi antaŭ la aŭtoritatoj kaj la publika opinio la taŭgecon de la internacia lingvo kaj praktike uzi ĉi-lastan je la servo de la sporto;
2. doni al la esperantistoj okazon partopreni en internacia renkontiĝo;
3. krei eventon, kiu altiru la atenton de la amasaj inform-medioj, radio, gazetaro kaj televido, kaj kiu potence propagandu Esperanton.

La fakto, ke multaj eksterlandaj esperantistoj veturos al Madrido el foraj lokoj por viziti la seminarion, devas kuraĝigi la Madridajn samideanojn — membroj kaj lernantoj de la Liceo—, kiuj ja havas la avantaĝon vivi en la Seminaria urbo, aliĝi grand-nombre al la pritemita manifestacio.

La Sporta Seminario estas nia komuna faro. Ĝia sukceso estos nia sukceso — ĉies sukceso! Ni ĉiuj, kiel esperantistoj kaj kiel loĝantoj de la ĉef-urbo, havas la moralan devon subteni ĝin per ĉiaj fortoj.

Siaflanke, la Seminario riĉigos nin per siaj instruoj kaj neforgeseblaj momentoj de internacia etoso. En la intereso de Esperanto kaj en la via, ne prokrastu unu solan minuton vian aliĝon. Vi trovos en aldono la provizoran programon de la Seminario kaj koncerne aliĝilon.

Bonvolu tuj plenumi ĉi-lastan kaj transdoni ĝin al la Sekretariejo kun la koncerna kotizo.

Krome, ne forgesu enŝovi en vian someran programon vian tut- aŭ part-tagan partoprenon en la Seminario.

La supran alvokon direktas al vi tutkore la Organiza Komitato ka la subskribinto.

Gian Carlo Fighiera

(Faka aliĝinta organizaĵo de Universala Esperanto-Asocio)

A L V O K O

La Estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-amatoroj (ILEF) alvokas ĉiujn geesperantistojn, kiuj okupiĝas aŭ havas deziron okupiĝi pri tiuspeca amatoreco, aliĝi al ILEF kaj per sia fervora laboro, kontribui al la plialtiĝo de la kultur-estetika nivelo de ĝia membraro kaj al la disvastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

ILEF estas politike neŭtrala organizaĵo, kies celoj estas direkti celkonforme la penojn kaj la iniciatojn de siaj membroj al sukcesplenaj aktivaĵoj en la kampo de foto-kino-magnetofon-amatoreco kaj disvastigi Esperanton pere de tiuj modernaj kaj efikaj amaskomunikiloj.

En sia agado ILEF klopodas organizi internaciajn konkursojn, festivalojn, ekspoziciojn, somerajn tendarojn kaj aliajn aranĝojn, kie oni povus interŝanĝi sperton pri fotado, filmado, sonbendigo, ktp.

Pere de siaj tri sekcioj - foto, kino, magnetofono - ILEF strebas unuigi la interesojn de siaj membroj kaj ŝanĝi materialon inter ili kaj kun aliaj esperantaj kaj neesperantaj organizaĵoj, ekz.: fotografaĵojn, filmojn, lumbildojn (diapozitivojn), foto-kino negativojn, magnetofonbendojn kun tekstaj aŭ muzikigitaj surbendigoj, fakajn librojn, ktp.

ILEF celas kontaktiĝi kun neesperantistaj internaciaj kaj landaj organizaĵoj de foto-kino-amatoroj kaj aliaj kluboj, kunlabori kaj partopreni aliajn iniciatojn kiel faka organizaĵo de UEA.

Ĉiu deziranto, kiu scipovas aŭ estas komencinta lerni Esperanton, povas membri en ILEF simple sendante skriban aliĝilon-demandfolion al la prezidanto de la organizaĵo, S-ro. Dončo Ĥitrov, Bul. Ĥristo Botev, 97, BG-1303 Sofio, Bulgario, Eŭropo, menciante jenon:

1. Antaŭnomo, familianomo, naskiĝjaro.
2. Profesio.
3. Adreso kompleta.
4. En kiuj sekcioj deziras kunlabori.
5. Ĉu posedas foto, kino, magnetofon-aparato kaj kian markon kaj kies produktaĵo ili estas.

La aliĝ-kaj-jarkotizon (4 usonaj dolaroj aŭ egalvalore en nacia valuto) oni pagas rekte al la Centra Oficejo de ILEF, bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303, Sofio, Bulgario (por ILEF), per bankĉeko al Bulgarian Foreign Trade Bank, BG-1000 Sofio, Bulgario, Str. Sofijska Komuna, 2.

Ĉiu membro de ILEF rajtas kaj havas la noblan devon helpi al la Estraro pere de novaj iniciatoj kaj proponoj por plibonigo de la agado. La Estraro de ILEF havas trijaran mandaton dum kiu ĝi agas laŭ la Statuto de la organizaĵo.

Dum la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno, ILEF okazigos sian regularan jarkunvenon, en kiu estos elektita la nova Estraro por 3-jara mandato kaj estos diskutitaj diversaj problemoj de la organiza kaj krea laboro. Ĉiuj ILEF-anoj, kiuj partoprenos la kongreson, estas petataj sin informi pri la dato, la salono kaj la horo de la jarkunveno kaj nepre ĝin partopreni! Estos bonvenaj esperantistoj, kiuj ekdezirus aliĝi al ILEF kaj fari tion dum la kongresaj tagoj.

KARAJ GEAMIKOJ! ESPERANTISTOJ, ALIGU AL ILEF KAJ ESTIĜU ĜIAJ AKTIVAJ MEMBROJ KAJ VIGLAJ PROPAGANDISTOJ DE TIES NOBLAJ CELOJ!
AL FRUKTODONA LABORO EN LA KAMPO DE FOTO-KINO-MAGNETOFON-AMATORECO!

Sofio, 1982

LA ESTRARO DE ILEF

PLATERO KAJ MI

Nia kara samideano Miguel Fernandez laboras en la tradukado al la Internacia Lingvo el la famkonata verko de nia nacia poeto Juan Ramon Jimenez "PLATERO KAJ MI" ("Platero y yo"). Jen la du unuaj ĉapitroj de lia tradukado.

1. PLATERO

Platero estas eta, haroza, milda; ekstere tiel mola, ke oni povus pensi ke ĝi estas tute el kotono, ke enhavas ostojn. Nur la gagataj speguloj de siaj okuloj estas malmolaj kvazaŭ du skaraboj de nigra vitro.

Mi ellasas ĝin libere kaj ĝi iras al la paŝteji, kaj varmete karesas per sia muzelo, apenaŭ frotetante ilin, la rozojn, ĉielajn kaj flavajn floretojn... Mi milde ĝin alvokas: "Platero?", kaj ĝi venas al mi per gaja trotadeto, kiu ŝajnas rido, mi ne scias en kia idea tintado.

Gi manĝas ĉion, kion mi donas al ĝi. Gi ŝatas mandarinajn oranĝojn, muskatvimberojn, ili ĉiuj el sukceso; violkolorajn figojn, kun la kristala mielguteto...

Gi estas kormola kaj dorlotema kiel infano, kiel etulino...; sed forta kaj durkora interne, kvazaŭ el ŝtono. Kiam dimanĉe mi rajdas sur ĝi, tra la lastaj stratetoj de l' vilaĝo, la kamparanoj, pure vestitaj kaj malrapidemaj, rigardas ĝin:

- "Tien' asero..." (Ŝtalon ĝi enhavas...)

Ŝtalon ĝi enhavas. Ŝtalon kaj lunargenton samtempe.

2. BLANKAJ PAPILIOJ

Nokto falas, bruma jam violkolora. Malprecizaj heloj malvaj kaj verdaj longdaŭras trans la preĝejturo. La vojo supreniras, plena je ombroj, konvolvuloj, bonodoro, herbo, kanzonoj, laceco kaj dezirego. Subite, obskura viro kun ĉapo kaj pikilo, kun tempere ruĝa malbela vizaĝo pro la lumo de la cigaredo, malsupreniras al ni de mizera domaĉo, perdiĝinta inter karbsakoj. Platero timiĝas.

- "Ba argo?" (Ĉu ion ĝi kumportas?)

- Vidu... Blankaj papilioj...

La viro volas najli sian feran pikilon en la spartokoberton, kaj mi tion ne evitas. Mi malfermas la dusakon kaj li vidas nenion. Kaj la idea nutraĵo transpasas, libera kaj naiva, ne pagante la akcizon.

ELEGIO DE JORGE MANRIQUE JE LA MORTO

DE LIA PATRO

(daŭrigado de la antaŭa numero)

Kio iĝis do la damoj
kaj la punto kaj veluro
kaj rubandoj?

Kio iĝis pasi/flamoj,
kiuj ardis sen mezuro
por amantoj?

Kio iĝis mandolinoj
kaj muzikoj trobadoraj
melodiaj?

Kio iĝis danculinoj
kaj la roboj silkaj, oraj,
fantaziaj?

Post li sekvis Don Enrique.
Kian forton li konkeris
per la esceptro!

Kiel mole kaj amike
la plezuroj lin preferis
sen escepto!

Sed lin poste mondo traktis
krude, kaj al li oponis
ĝisekstreme,
kaj tre baldaŭ de li kaptis
kion ĝi antaŭe donis
bonvoleme.

La donacoj superlimaj,
la palacoj, la brokatoj
kaj la oro;
la servicoj tiel glimaj,
la "henrikoj" kaj dukatoj
de l'trezoro,
la ĉevaloj, kiuj paŝis
en drapiroj, la ninstreloj,
la fasono
kien tio ĉi sin kaŝis?
Ĉu ne temis pri roseroj
sur gazono?

Lian fraton sincer-koran
oni nomis heredanto
de la krono;
nobelaron tre valoran
li alvokis tra la lando
al la trono;
sed ĉar li estas mortema,
Morto falĉis lin kaj prenis
kaj ensakis.

Ho la Volo fatal-semá!
Kiam li de suko plenis
Ĝi lin hakis.

Pri la Konestablo fama
kiu super ni prezidis
.. povosida,
ni ne estu jam proklama,
pensu nur, ke ni lin vidis
kol-hakita.

Liaj povoj kaj trezoroj
kaj vilaĝoj kaj palacoj
en kombino,
kio estis, se ne ploroj
kaj afliktoj kaj agacoj
ĉe la fino?

Kaj la du aliaj fratoj
iĝis preskaŭ tiel riĉaj
liel reĝoj
aplikante al regatoj,
kaj humilaj kaj prestigaj,
siajn leĝojn.

Tia vivo de prospero
alta, riĉa kaj prodiga
kaj laŭdata,
Ĉu ne estis kiel helo,
kiun kovras obskuriga
nigro fata?

Tiom da nobeloj bravaj,
kiuj dukis kaj baronis
kaj markizis
kaj paradis potenc-havaj,
Ĉu ne ilin Morto spronis
kaj surprizis?

Sur iliaj gloraj faroj
en milito kaj en paco
Morto tretis.
Kun la krudo de barbaroj,
en forgeson Ĝi, sen laco,
ilin ĵetis.

Batalantoj en amasoj
vanas, ankaŭ la kasteloj
kaj la turoj,
oriflamj kaj kirasoj
kaj remparoj kaj kreneloj
kaj la muroj.
Eĉ se larĝa foso kuŝas
eĉ se ŝirmoj tre fortikas,
estas vane.
Kiam vi, ho Morto, puŝas,
via sago ĉion pikas
tute same.

Don Rodrigo de Manrique,
jen nobelo bravo-plena,
virto-ama.

La bonulojn li efike,
kore helpis, sindonema
kaj humana.

Liaj faroj grandaj, klaraj
ĉar viditaj, ne bezonas
laŭdon homan.

Ni pri ili estos ŝparaj,
ĉar la tuta mondo konas
lin renoman.

Kiel frata al amiko!
Kiel nobla al parenco
kaj subulo!
Kiel dura malamiko!
Kia majstro de potenco
kaj bravuro!
Kia saĝo ĉe ĝentilaj!
Kia spirito ĉe ŝercantoj!
Kia kono!
Kia molo ĉe humilaj!
Kontraŭ fiaj arogantoj,
kia leono!

En bonŝanc' Oktaviano.
Jen Cezaro en batalo kaj h no
kaj honoro.
En virtemo Afrikano,
Hanibalo en lojalo
kaj laboro
Bona ja, kiel Trajano.
Tito en la regalemo
grand-anima.
En la fort' Aŭreliano.
Marko Tuljo en la sinteno
ver-esprima.

Anton-Pio en pardonsento.
Mark-Aŭrelio en ekstero
trajt-serena.
Adrian' en elokvento.
Teodozjo en tolero
kompatema.
Aleksandro en rigoro
kaj en disciplin-severo
de luktanto.
Konstantino en fervoro
kaj Kamil' en sinofero
por la lando.

Sed en lia vivo-daŭro
grandan riĉon li ne tenis
nek trezoron.
Tamen venkis al la maŭro,
kaj kastelojn, lokojn prenis
kaj la gloron.
Kaŭze de la batalado
multaj maŭroj kaj ĉevaloj
falas morte,
sed li gajnis sur ĉi pado
same rentojn kaj vasalojn
brakoforte.

Alitempe, pli antaŭe,
pro fidel' al siaj stato
kaj skrupuloj
li mizeris, sed baldaŭe
lin subtenis liajn fratoj
kaj subuloj.
Post ol gloro kaj kuraĝe
li militis en konkero
energia,
li traktatis avantaĝe
aldonante pli da tero
al la sia.

Al la faroj historiaj,
kiujn li junage kronis
per kuraĝo,
nov-impete jam aliajn
kromajn venkojn li aldonis
en oldaĝo.
Pro la fama aŭreolo,
la oldeco, la virtemo
kaj la gravo
lin distingis la titolo:
kavaliro de Ordeno
de la Glavo.

La kasteloj liaj nunaj
iam estis en posedo
de tiranoj;
per sieĝoj oportunaj
ĉiun fleksis al submeto
liaj manoj.
En agado perbatala
luktis lin por reĝo nia
kaj tre lertis.
Ja la reĝo Portugala
kaj la bando Kastilia
tion spertis.

Post ol li la vivon vetis
tiel ofte por la bono
suverena,
post ol riske li sin metis
en la servon de la krono
rajto-tena,
post luktado trakampanja,
kiun li multfoje kapis
kontraŭ hordon,
li troviĝis en Ocaña,
kiam Morto voke frapis
lian pardon.

Kaj Ĝi diris: "Grand-sinjoro
lasu jam ĉi mondon vanan,
estas ende;
via forta, ŝtala koro
montru sian bravon faman
ĉi-momente.
Ĉar la sanon kaj la vivon
neglekteme, pro la gloro
vi provokis,
virton metu en edifon
rezistente al hororo,
kiu vokis".

"Ne rigardu kún teruro
la batalon tiel dramon
kiu ekas.
Vi plu vivos en figuro
de la famo...Ĝin, aklayan,
vi jam regas.
Eĉ se tia viv' honora
estas ankaŭ nek ĉiama
nek laŭvera,
tamen estas pli valora
ol l' alia, la profana
kaj surtera".

LA MALJUNULINO KAJ LA MORTO
(Hungara fabelo)

Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabeloceanon, vivis maljunulino, pli maljuna ol la landvojo, sed morti ŝi ne volis. Forte ŝi amis la vivon. Infanojn ŝi ne havis, neniun ŝi havis, malgraŭ tio ŝi ĉiam iris-venis, laboris, kolektis la sonorajn talerojn. La tulipa kesto jam pleniĝis de oro kaj arĝento. Doloris ege ŝia koro, se ŝi pensis pri tio, ke iam venos la Morto kaj ne demandos: ĉu vi venos aŭ ne, nur prenos ŝin kaj forportos.

Kaj vere, bone ŝi pensis, ĉar subite alvenis la Morto kaj diris al ŝi:

- Preparaĝu, maljunulino, ĉar mi forportos vin.

Petis, petegis lin la maljunulino:

- Ankoraŭ dek jarojn.

- Ne, ne eblas, mi forportos vin.

- Ankoraŭ nur kvin.

- Ne, ne eblas, preparu vin; mi jam skribis vian nomon en mia granda libro, mi ne povas forstreki ĝin.

Sed la maljunulino tiel ploris, tiel petegis, ke la Morto donacis al ŝi tri horojn.

- Donu pli da tempo - petis la maljunulino -, lasu min ankoraŭ vivi iom. Venu morgaŭ!

- Je Dio - diris la Morto -, do estu tiel! - kaj li ekiris, sed ankoraŭ aldonis: Sed morgaŭ mi fakte venos!

- Bone, nur venu - diris la maljunulino -, sed sciu, estos pli bone, se vi skribos sur la pordofosto "morgaŭ", por ke mi ne forgesu.

La Morto prenis el sia poŝo kreton kaj skribis sur la pordofosto "morgaŭ", kaj foriris.

La sekvan tagon frumatene venas la Morto kaj la maljunulino ankoraŭ kuŝas en la litō.

- Ek, maljunulino, jam forpasis via tempo.

- Tute ne forpasis - diras la maljunulino - rigardu la pordofoston, kio estas surskribit? Hodiaŭ vi ne rajtas forporti min, nur morgaŭ.

Tio daŭris unu semajnon, du semajnon, la Morto ĉiutage venis por la maljunulino. Sed la maljunulino ĉiam akurate montris la pordofoston, kaj la Morto ĉiam foriris kun granda kolero. Sed fine li trovis sufiĉa la multan vandan iradon, forviŝis la skribon de sur la fosto kaj minacis la maljunulinon:

- Nu, atendu, morgaŭ mi vere forportos vin, mi ne indulgos.

Hej, Dio mia, ektimis la maljunulino, ŝia tuta korpo tremis, kiel la poplofolio, ŝi deziris kaŝi sin ie, kie la Morto ne trovos ŝin.

- Hop, jen - ŝi pensis. Ŝi havis kuvon plenan per mielo kaj ŝi kaŝis en ĝi.

- Nu, ĉi tie certe li ne trovos min.

Sed ankaŭ tie ĉi ne trovis trankvilon, ĉar ŝi timis, ke tamen la Morto trovos ŝin. Elŝoviĝis el la kuvo, fendis la kusenegon kaj kaŝis sin en la plumflokaj de la kusonego.

Tie ŝi restadis kelktempe, sed ankaŭ tie ĉi ne havis trankvilon. Elŝovis sin el la kusonego por trovi pli bonan lokon.

Ĝuste ŝi elŝovis sin, enpaŝis la Morto. Li rigardas, rigardadas, kio povas esti tiu blanka, plumhava monstro. Li terure ektimis, kaj tiel li forrapidis, ke eĉ per mielkuko oni ne povus relogi lin.

La maljunulino eĉ nun vivas ankoraŭ. Morgaŭ ŝi estu via gastō.

(Elĉerpita el la libro de Elek Benedek "HUNGARAJ FABELOJ"
eldonita de la Hungara E-o Asocio, okaze de la Internacia
Jaro de la Infano, Budapeŝt, 1979. Tradukis: Maria Benczik)

VIVO DE NIA LICEO

- La pasintan 24-an de Februaro, nia Liceo havis interesan kaj agrablan viziton: F-ino TAMIKO KAUAKAMI-NIELSEN vizitis nin kaj regalis la multnombrajn ĉeestantojn per belega, simpatia prelego rilate al siaj vojaĝoj tra la tuta mondo, kiujn ŝi faras kun la nura celo disvastigi kaj propagandi Esperanton. F-ino Tamiko estas simpatia kaj bela japanino edzigitita kun norvega esperantisto, loĝanta en Oslo. Jam ekde multaj jaroj, ŝi dediĉas sian libertempon por vojaĝi preskaŭ tra la tuta mondo, nur kun sia bunta kimono kaj kun la Internacia Lingvo, por montri al la homoj el ĉiuj la landoj, ke Esperanto estas vivanta lingvo, kiu povas alporti al la homaro amikecon, amon kaj interkomprenon.

- La pasintan 31-an de Marto, okaze de malgranda festeto de la Liceo por festigi la finon de la unua ĉijara kurso kaj la disdonado de Diplomojn de la Baza Kurso, nia samideano José F. Arroyo, prelegis kaj projekciis interesajn lumbildojn pri la temo PACAMA MUZEO DE HIROSIMO. La dramatikaj elokvenco de la lumbildoj kaj la oportunaj klarigadoj de nia amiko Arroyo, faris al ni ĉiuj senti la teruregan krimon okaziginta al tia japana urbo, en kiu pli ol 200.000 senkulpaj homoj pereis en kelkaj minutoj dum la eksplodo de la unua usona atombombo.

- Por la nuna Printempa sezono, nia sperta kunsilanto pri Edukado S-ro Dennis Keefe, organizis diversajn kursojn laŭ la jena kadro:

KURSO	HORO	TAGO	KOMENC/FINIGO	PROFESORO
1. BAZA KURSO/1	19:00-20:30	L-Me	19 Apr/21Jun	Laureano
2. BAZA KURSO/2	10:30-22:30	L-Me	20 Apr/22Jun	Dennis Keefe
3. Baza Kurso/3	19:00-20:30	Ma-Ĵ	20 Apr/ "	Aŭgusto
4. Baza Kurso/4	20:30-22:00	Ma-Ĵ	20 Apr/ "	Miguel Fernandez
5. Baza Kurso/5	11:00-13:00	S	24 Apr/ "	Jorge Camacho
6. Baza Kurso/6	10:30-12:00	D	25 Apr/ "	Jorge Bueno
7. Baza Kurso/7	12:30-14:00	D	25 Apr/ "	Jorge Camacho
8. Perf.Kurso/1	19:00-20:30	L	20 Apr/ "	Juan Carlos
9. Perf.Kurso/2	20:30-22:00	Ma-Ĵ	20 Apr/ "	Aŭgusto
10. Perf.Kurso/3	19:00-20:30	Ma-Ĵ	20 Apr/ "	Miguel Fernandez
11. Kurso Prof/1	19:00-20:30	Me.	21 Apr/ "	Juan Carlos
12. Kurso Prof/2	18:00-19:00	L	26 Apr/ "	Dennis Keefe
13. Helpanto/1	19:00-20:30	Ma-Ĵ	20 Apr/ "	Inocencio
14. Helpanto/2	19:00-20:30	Ma-Ĵ	" "	Rafael
15. Helpanto/3	20:30-22:00	Ma-Ĵ	" "	Miguel Romero
16. LINGVAJ ELEMENTOJ KAJ ESPERANTO	18:00-19:00	Me.	21 Apr/ "	Miguel Angel
17. TEMOJ DE ESPERANTO	19:00-20:30	L.	19 Apr/ "	Dennis Keefe

- PAELLA.- La venonta 30-an de Majo, okaze de la 4-a datreveno de la translokiĝo de Madrida Esperanto Liceo al nia nova sidejo en Atocha 98, ni ekskursos kaj "paellos" al la belega kaj proksima montaro Navacerrada.

Ni faros 5 "paella", manĝos ilin, trinkos kaj drinkos kaj amuziĝos.

La eliro estos ekde la Liceo, je la 9-a matene akurate. Ni veturos per niaj aŭtomobiloj. Tiuĵ kuraguloj kiuj povas kuiri "paella", povas havi la okazon ricevi premion. Bonvolu konfirmi la partoprenon por kalkuli la lokojn en la aŭtomobiloj.

KELKAJ KONSILOJ PRI STILO

Ni daŭrigas en tiu ĉi numero la "konsilojn pri stilo" elĉerpitajn el la libro de F. Paulhaber "NE TIEL, SED TIEL ĈI!", pensante, ke ili povas esti utilaj kaj klarigantaj por tiuj kiuj deziras perfektigi sian esperantan stilon.

C. Aliaj ripetiĝoj.

Sinsekvajn frazojn oni ne finu per samaj aŭ similtionaj vortoj aŭ per sama ritmo.

A - Ne tiel.....
Fraŭlino B. estis zorgoplena kaj afabla al ŝi. Ŝi alportis manĝaĵon al ŝi, ĉar Trees nun ne povis zorgi pri tio, kaj vespere ŝi restis horeton kun ŝi.

B -sed tiel ĉi.
Fraŭlino B. estis al ŝi zorgoplena kaj afabla. Ŝi alportis manĝaĵon, ĉar Trees nun ne povis zorgi pri tio, kaj vespere ŝi restis kun ŝi horeton.

En kolono A du frazoj finiĝas per samaj vortoj (al ŝi), kaj ĉiuj frazoj finiĝas per la sama ritmo (al ŝi, al ŝi, kun ŝi). Tio sonas malbele. Donante al la aliaj vortoj alian lokon, kie ilia ripetiĝo ne ricevas akcenton, kaj forigante unu "al ŝi" (ĉar la kunteksto estas sufiĉe klara), ni akiras pli kontentigan rezultaton.

Klopedu ŝanĝi tiel la jenajn tekstojn en kolono A, sed antaŭe kovru kolonon B.

Kio estas al vi, kial vi estas tiel ekscitita? li demandis, prenante ŝian manon. Ŝi kapneis, liberigante sian manon.

(-ante sian manon, - ante sian manon): Kio estas al vi, kial vi estas tiel ekscitita? li demandis prenante ŝian manon. Li liberigante, ŝi skuid la kapon.

Kiam mi dungas laborantojn kaj instruas ilin, mi devas unue iom laŭdi ilin ĉe ĉiu progreso por kuraĝigi ilin.

(ilin-ilin-ilin): Kiam mi dungas laborantojn kaj ilin instruas, mi komence devas ĉe ĉiu progreso iom laŭdi tiujn homojn por kuraĝigi ilin.

Okazis foje, ke malriĉa knabo insultis lin, kiam li persekutis lin.

(lin-lin): Iam okazis, ke malriĉa knabo lin insultis, kiam li persekutis lin.

Ĉ. Rimoj

Same malbele sonas ankaŭ hazardaj rimoj kaj rimoidoj. Kovru kolonon B kaj klopedu eviti la rimojn en kolono A.

A - Ne tiel.....
Mi citos al vi, kion li diris al mi.

La loĝado en la mansardo, vintre, printempe kaj aŭtune tiel gaje suna, iĝis sufero en la mezo de la somero.

Mi ŝatis la laboron kaj lernis dum mi vendis.

Li parolis tre dialekte, kaj post post prezentiĝo li diris rekte..

Dum momento tio trankviligis lin, sed tuj poste li sentis, ke li ne plu kredas ĝin.

B -sed tiel ĉi.

(al vi - mi): Mi citos, kiom li rakontis al mi.

(ero -ero): La loĝado en la mansardo vintre, printempe kaj aŭtune tiel gaje suna, iĝis turmento en la mezo de la somero.

.... lernis vendante.

Li parolis tre dialekte kaj post prezentiĝo li rekte diris.

(lin-ĝin): Dum momento tio trankviligis lin, sed tuj poste li sentis, ke li ĝin ne plu kredas.

(daŭrigota)

Se iu demadus al mi kia estis la tendaro de Logroño, mi respondus simple per du adjektivoj: juna kaj ripetinda. Ĝi estis juna ĉar ĉiu oficiala decido estis diskutata inter geuloj kies aĝoj ne superis 25 jarojn. Kaj estis ripetinda ĉar ekde la komenciĝo evidentiĝis etoso plena de iluzio, kunlaboremo kaj matureco inter la partoprenantoj.

La fizika loko kie la renkontiĝo okazis estis areo de kampadejo speciale rezervita por la geesperantistoj. Tie ni tendumis lasante liberan centran spacon por diskutaj rondoj.

Naŭdek samideanoj kuniĝis. La vetero, suna kaj varmeta, invitis al simpatia amuzo kaj kamparaj ekskursoj. La ĉeestintoj, kun kontentiga ĉingva nivelo, praktikis siajn esperantajn konojn kaj interŝanĝis rakontojn de vivspertoj.

Daŭre de la tendaro estis aranĝitaj pluraj aktivaĵoj. El ili mi skizos sekve kiujn mi rememoras:

- ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO.- Klarigita de Aŭgusto Casquero, prezidanto de la Grupo de Madrido.

- ENKONDUKA KURSO DE E-o POR PROFESOROJ.- Instruita de Denis Keefe, usona fakulo pri la rekta metodo.

- PROJEKCIO DE LUMBILDOJ.- Farita de Juan Carlos Ruiz pri "Belaĵoj el la mondo".

PROJEKCIADO DE LUMBILDOJ.- Humora prezentado aranĝita de Raúl López pri la "Brigado en Hungario".

- INFORMA RONDO PRI LABORBRIGADOJ.- Gvidita de la Grupo de Bilbao.

- DISKUTRONDOJ PRI a) PROPAGANDO, b) ROLO DE LA JUNULOJ EN LA GRUPOJ.- Paroprenis membroj de la Grupo de Valencia, Elche, Valladolid, Bilbao, Zaragoza kaj Madrid.

- TUTAGA EKSKURSO AL "SANTO DOMINGO DE LA CALZADA".- Organizita de la loka grupo.

- VINAJ EKSKURSOJ.- Ĉiuvespere kantata rondiro tra la malnovaj tipaj vinejoj de la urbo (ĝi estis la plej ŝatata aktivaĵo).

- PRAKTIKADO DE ESPERANTAJ KANZONOJ.- Organizita de la Grupo de Madrid kaj Callosa del Segura (Alicante).

- DISKUTADO PRI LA FARINDA STRUKTURO DE LA JUNA SEKCIO DE H.E.F.- Kunordigita de la vizprezidantino kun la partopreno de estraranoj kaj membroj de H.E.J.S. Miguel Angel Sancho, de Madrido, prezentis kompletan programon de agado.

- GENERALA ASAMBLEO DE H.E.J.S.- En ĝi la estraro renoviĝis; oni informis pri la novaj linioj de H.E.J.S. kaj estis decidite ke la sekvonta tendaro okazos la venontan Paskon en la "Esperanta Oazo" (Gandía, Valencia).

- FENA ADIAŬA FESTO.- Oni faris komunuman elspezon po cent pesetoj ĉiu persono, kaj la turisto de la kampadejo aranĝis vespermanĝeton konsistanta el 35 litrojn de "sangría" kaj 10 gigantaj terpomaj omletoj.

Rilate al la propagando, ĉio rezultis perfekte. Du programoj en radio, unu por la regiona televido kaj nombraj artikoloj en ĵurnaloj resumas tiun sukcesan aspekton de la organizo. (Je tio ni aldonu, ke la Grupo de Valencia faris ekspozicion de esperantaĵoj en la centra placo de la urbo).

Koncerne al la agado de la loka grupo, estas devige rimarki la grandan laboron plenumita de la prezidantino de H.E.J.S., Ana Maria Ranero, kiu entuziasme prizorgis ĉiun programeron kaj fariĝis la ĉiesa helpantino.

Restas al mi elstarigi du lastajn aspektojn: la unua temas pri tio ke la gejunuloj interŝanĝis vivantajn spertojn el la esperanta movado (laborbrigadoj, vojaĝoj, pasporta servo, tutmondaj kongresoj...k.t.p.) La dua estas, ke la grupoj de Valencia, Elche, Callosa kaj Alicante kuniĝis por la vojaĝo kaj luis aŭtobuson per malalta prezo (45 personoj pagis entute 75.000 ptojn. tio estas, ĉiu elspezis po 1.750 ptoj. por la kompleta vojaĝokosto de pli ol 1.100 km). Ambaŭ aferoj estas gravegaj precedencoj. Interesaj imitinda

Nia Voĉo

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

Octobro - Novembro 1982



MADRIDA
ESPERANTO
LICEO

c/ Atocha, 98
Madrid, 12 - Hispanio
Tel. 230 87 98

DIRU AL MI KIEL VI AGAS....

Multfoje mi pensis, ke ĉiu homo sin portretas en siaj agoj, en la profesio, kiun li proprevole elektis, en la aktivaĵoj al kiu li dediĉas sian libertempon, en la formo kiel li marŝas, parolas, skribas, manĝas, salutas, agas.... Fakte, ĝis la plej malgranda gesto de la homo povas elmontri, almenaŭ, iun signifan parton de sia kaŝita personeco.

Esperanto, aŭ plej bone dirite, esperantismo, estas do unu el tiaj aktivaĵoj kiuj, ankaŭ difinmaniere, montras la personecon de siaj "kredantoj" pro tio, kion ĝi enhavas je fido en la homoj kaj en la homaro. Eble estas facile kredi al Dio, sed la fido al la homoj povas esti iom pli malfacila. Kaj knedi al "malfacilaj" aferoj apartenas al la idealismo, al la sfero de la "strangaj mistikoj", iamaniere, al la subtila kampo de la poezio. Labori kaj dediĉi parton de sia vivo pro io, kion oni konsideras kiel grandan bonon por la homoj, por la homaro, ne esperante materialan profiton por si mem, estas sindona kaj altruisma sinteno iom proksima al heroeco.

Pro tio, mi pensas, ke ĉiu esperantisto estas kiel speco de idealisto, apostolo de la tuthoma interkompreno, pli-malpli fervora kredanto je la bezono de la, iu-tempa, tutmonda disvastigo de la Internacia Lingvo. Kaj, laŭ la formo en kiu li agadas pro sia celo, li mem sin montras. Tiu, kiu entuziasme plibonigas la scipopon de la lingvo, kiu aktive kunlaboras, fervore instruas, konstante praktikas kaj ofte kunvenas kun siaj samideanoj kaj iamaniere helpas la laboron de sia grupo, estas digna esperantisto.

Baldaŭ - en la jaro 1987 - Esperanto estos centjara. Kiel ni povas konsideri la rezultojn el tiu-ĉi unua jarcento de kiam nia kara majstro finfine trovis la genian solvon por unu Internacia Lingvo? Ĉu ni devas valori la fruktojn kiel abundajn? Ĉu ni povas juĝi ilin kiel nesufiĉajn? Mi ne intencas nun eniri en tian malfacilan taskon. Mi nur rigardos la fakton, ke Esperanto estas jam perfekta (aŭ "preskaŭ" perfekta?) interhoma komunikilo, profunde kaj vaste dissemita tra multaj landoj de la tero, kun grandega kaj altvalora kultura heredaĵo, kaj ke tiu ĉi fakto ne estas devigata al neniu supernatura miraklo. La nuna stato de Esperanto en nia hodiaŭa mondo, estas "nur" la laboro de miloj da "dignaj esperantistoj", kiuj fide kaj entuziasme alportis siajn sablerojn, siajn ŝtonetojn, al la konstruado de la tuthoma esperantismo. Ne gravas la nomoj - famaj aŭ nekonataj -, gravas la homoj per sia laboro. Dank al ili, la konstruaĵo kreskis kaj nun estas al ni la respondeco daŭrigi ĝia pligrandigado. Jes, al ni, kiuj ankaŭ kredas je "malfacilaj aferoj"; al ni, kiuj ankaŭ estas kvazaŭ "strangaj mistikoj", kvazaŭ poetoj, kvazaŭ apostoloj de nia bela kaj sindona idealo.

Kaj ankaŭ al VI, kara liceano, kara amiko - pli-malpli konata-, kiu de tempo al tempo ricevas tiun "NIA VOĈO"-n. La respondeco de la daŭrigado de la longa laboro estas ankaŭ en viaj manoj, se estas vero, ke vi amas Esperanton kaj kredas en ĝia idealo. Ne forgesu, ke VI, jes, ANKAŬ VI, kara amiko, devas alporti vian malgrandan sableron, vian sindonan ŝtone-ton, kaj vi ne devas lasi ĝin fali senutila ĉe viaj piedoj.

José F. Arroyo

BALADO AL PORT STANLEY

Estas jam neniu en tia nekonata nenies tero. Nur malmola vento de tempo al tempo sekigas viajn pupilojn aliiĝinajn en argenton. Ĉe viaj plandoj levkojoj kaj malvoj penas grimpi sur vian vizagon. Viaj plandoj! Sube la maro. Fojfoje lazuraj ondetoj lekas la randojn de via korpo. Vulturoj ĉirkaŭflugas super viaj larĝe malfermitaj okuloj. Viaj okuloj, soldato, angla soldato, argentina soldato, frato!

La atako de la malamiko estis repuŝita kaj vi en la tranĉeo ĝojis pro tio kun viaj kamaradoj. Oni gratulis vin, Perez/Monroe, "kuraĝa dudekunujaraĝulo, studento en Buenos-Ajresa/Oksforda universitato, pro la arda defendo de via pozicio". Tiu "arda defendo" signifas, ke vi pafale faligis teren, plate sur la ventron, kvin senkulpajn homojn. Tiel senkulpaj kiel vi mem, kartonpasta nacia heroo, pretervola murdinto, povra. Vi trompote soldatiĝis tial, ke... Nu, ĉar oni parolis al vi pri honoro kaj patrujo, tiuj du bombastaj vortoj, kiuj kune tiom da mortigitoj estigis ĉiam kaj ĉie... Kaj vi ekmalamis aliajn homojn, vi Perez/Monroe, bona knabo, ŝatanto de la "rok-muziko" de Rolling-Stones kaj somera spertinto de la komunuma vivo en Ios-insulo, kune kun tutmondaj uloj, same, kiel Monroe/Perez. Domage!

Unuafoje, ĉe la sono de la vorto "mortigu", kriita de sadista frenezulo, vi retroiris enpenŝiĝe auskultinte ene: "sancerba homo ne povas fari tion". Subite, barbara sangsojfa voĉo pravigis la nepran neceson murdi laŭlege. Finfine vi antaŭeniris kaj pafis sen ia ajn konscienciproĉo. Ho ve, malbeninta ordono! Ho ve, sensenca milito en nenies tero! Ĉar... kies estas la tero, regantoj de la mondo? Sciu, ke la tero estas ĉies propraĵo. Sciu, ke eĉ unu sola guto da homa sango estas milfoje pli grava, ol ĉiuj insuloj de la mondo. Ho ve, kompatindaj malaperintoj! Via stulta mortigo falu sur la kapojn de la naftavidaj komercistoj, kiuj vin forpelis en bataalkampon per kortuŝaj patriacaj paroladoj!...

Nun stela duonsfero palpebrumas super Port Stanley. Oni jam ne plu aŭdas pafojn nek eksplodojn. Vi, Perez/Monroe, kuŝas tute longa kiel vi estas. Eble vi pensas laŭ la maniero de la mortigitoj, eble vi nur vidas, flaras, sentas la sorĉon de la nokto, senpense, trankvile... Bestecan mortan krion la kuglo elŝiris el via kerno, sed ĝi restis kaptita ĉe viaj dentoj en la ĝusta tempero, kiam la mondo renversiĝis kaj la bildoj haltis. Tiaj bildoj!: malamika taĉmento sturme, tankoj, krioj kaj timego; kunuloj, kiuj, per suprenatenditaj brakoj, kapitulaciis... kaj tia nebridebla deziro forkuri malantaŭen, kaj tiu kuglo, kiu trafis vian koron, Perez/Monroe, malnova "mondcivilitano", estonta kuracisto en Tukumano/Manĉestro, frato...

Nun jam finiĝis la milito. Anglaj impostpagantoj trankvile dormos: la nacia honoro ja restis senmakula kaj la glora imperio pludaŭras. Argentinanoj manifestacias kontraŭ la registraro ne pro tio, ke ĝi estas enkondukinta la liberecon en la kloakojn, malaperiginta centojn da homoj; ne, ne pro tio, sed tial, ke ĝi kapitulaciis en la fia absurda malsaĝa stultega milito. Kia naŭzo!

Kaj vi, Perez/Monroe, bona knabo, Rollingstones-ŝatanto, komunucisto en Tukumano/Manĉestro, frato, kuŝu senzorge apud la strandon inter nevoj kaj ŝaŭmoj en nenies tero... Transe, milionoj da junuloj eble aŭskultos viajn plendojn vagantajn tra la aero. Eble morgaŭ, vi vidos grandan sunon eliĝi el la horizonto. Dume ni atendas kaj esperas kaj... tiel... plu....

Miguel Fernández

VULPOJ DE ĈIRONNUP

Estas sur la norda maro insuleto nomata Ĉinnorup.
En printempo, kiam ekfloras vulp-primuloj, venis ĉi tien avo kaj avino kiel kutime.

Tio okazis en la jaro, kiam pli kaj pli furioziĝis la milito.

Ĉesis longedaŭra neĝado, kaj alfluis glaciblokoj plene ĉirkaŭ la insuleto. Naskiĝis du vulpidoj en kaverno situanta profunde en betularbaro. Ja viveca estas la vulpa etulo. Li paŝas eksteren ŝanceliĝante. Ja dorlotita estas la vulpa etulino. Ŝi jam longe ne forlasas la manon de sia panjo.

Gepatraj vulpoj instruis al la demanigitaj etuloj, kiel rekoni kaptindaĵojn per flaro. Ĉar ili ne povus kapti nutraĵojn per si mem, se ili ne povus rekoni kio ĝi estas. Patra vulpo alvokis vulpidojn kaŝinte siajn akiraĵojn aŭ en arbetaro aŭ sub la tero. La etulo tuj alkuras kaj ĉirkaŭflaras kun la nazo spasmetanta. La etulino estas tute indifera. Ĉiufoje ŝi malaperas ien postkurante papiliojn.

Staris sur la monteto ŝtona statuo de Knabina Ĵizo. Ne estas certe, kiam kaj kiu starigis ĝin. Ekfloris vulp-primuloj jen unu, jen alia. - "Antaŭ ĉijare ni venis antaŭ vin. Favoru nin per multe da fiŝoj..." La avo kaj avino kumpremis la manojn kontraŭ la Ĵizo.

"Jen! eh! Aminda vulpido!" Ĉu perdinte vojon disde siaj gepatroj, la vulpido sekvis la geavojn ĝis la dometo ĉe la piedo de la monteto. Kiam la avino donis al ĝi fiŝeton, la vulpido elmanĝis ĝin en momento. Trovante la vulpidon ne volanta foriri, la avino alligis ruĝan rubandon ĉirkaŭ ĝia kolo. Kaj ŝi metis ĉe la nodo unu floreteton de vulp-primolo. - "Nu, mia etulino, vi restu mia familiando ĝis vi kreskos iom pli". La etulino fariĝis iom post iom familiara al la geavoj. Hieraŭ ŝi akompanis la avinon, kiu iris pluki manĝeblajn herbojn. Hodiaŭ ŝi fiŝas sur la maro kune kun la avo. Estas malvarme sur la norda maro eĉ dum somermezo. Sinsckas tagoj kun densa nebulo, kaj la suno malofte montras sin.

Iun tagon ĉirkaŭ la fino de mallonga somero, la avino sekigis kolektitajn laminariojn ĉe la strando. La etulino petoladis absorbita. Estis tia momento, kiam alproksimiĝis nigra figuro de trans la densa nebulo. - "Ĉu ne okazis io neordinara?". Ĝi estis patrola ŝipo de soldatoj gardantaj la nordan maron. - "Ha, jen vulpoj!". Unu el la soldatoj estis preta ekpafi. - "Ho, ne! Ne pafu la etulinon!". La avino volis forkuri senkonscie ĉirkaŭbrakante la etulinon, tamen stumblinte pro ŝtoneto, falis surgenuen. La soldatoj foriris nenion farante.

Kiam flaviĝis la folioj de betularo, por la geavoj baldaŭ venos la tempo forlasi la insuleton. La avino iris preĝi al la Ĵizo akompanate de la etulino. - "Dank'al vi, ni povis kapti multe da fiŝoj ankaŭ ĉijare. Ni forlasos vin jam morgaŭ". La avino fikse rigardis la etulinon sidantan en ŝiaj brakoj. Kaj metinte ŝin surteren ŝajne kun rezigno, ŝi malstreĉis la rubandon ĉirkaŭ ties kolo. - "Post ĉio, estos pli feliĉe por vi reiri al via patrino. Nu, iru tuj!". Guste tiam aŭdigis mallalta krio de vulpo el la profundo de la arbaro. La etulino forsaltis kun la korpo globigita.

Venis la mateno, kiam ili forlasas la insuleton. La avo ekremis per la tuta forto. La ŝipeto estis tre peza, plene ŝargite per laminarioj kaj fiŝoj. - "Vidu, avino! Ili estas vulpoj, ĉu ne?" "Jes certe! Videblas ankaŭ etulino!". Ekkriis la avino ŝovante sin antaŭen. - "Hej, etulino! Ni venos ankoraŭ venontan jaron. ---Ni nepre venos, kiam vulp-primuloj ree estos en la plena florado..."

sur la monteton. La etulo tre ŝatas kapti raton. Kiam la patro svingas vivantan raton tenatan en la buŝo, la etulo impete alsaltas ĝin. La dorlotita etulino nur bojetis infanete. Venis la sezono kiam ekfajfas norda vento. La vulpidoj kreskis rimarkinde, kaj la haroj fariĝis brilete belaj. La etulino, tamen, neniam apartiĝis de sia patrino kien ajn irante. La etulo fariĝis tiel rapidmova kiel la patro, kaj volonte ekiris sola kien ajn. Hodiaŭ li iris al la rivereto fluanta laŭ la piedo de monteto. Li havas intencon kapti salmon suprennaĝantan la rivereton por meti ovojn. Pif, paf! Eksonis terura bruo. Subite falis la etulo. - "Kva!" kun la krio eksaltis la patra vulpo sur la monteto. Paf! Paf! Pafi! La patrino vulpo abrupte falis antaŭen, sed salte levis sin tuj poste. La gepatroj kaj la etulino kuregis en la profundo de la arbaro. Estis mallume en la profundo de la betularbaro. Gutis sango el la ingveno de la patrino vulpo. La patra vulpo zorgeme lekis la vundon. Pasis la unua nokto kaj la dua nokto, tamen ve, la etulo ne revenis. Eble pro malsato, la etulino eliris sola al la arbaro vagemo serĉante nutraĵon. "Boj, boj, boj!". Aŭdiĝis la jelpo de la etulino. La gepatraj vulpoj streĉis la orelojn. Eksterordinare! Ili ambaŭ kuregis direktente sin tien, de kie aŭdiĝas la jelpo. Sub la ombro de bambuetaro, la etulino baraktis per siaj kruroj. La krurojn de la etulino firme mordkaptis malmola fera kaptilo. La kaptilo devas esti preparita de la soldatoj. Patra vulpo provis forte tiri la kaptilon, sed vane. La kruroj de la etulino neniel liberiĝis. Etulino nur ploradas pro doloro. La patra vulpo penis mordbranci la ĉenon per siaj akraj dentoj, tamen li neniel povas demordi la feran ĉenon. Strangan odoron alportis vento. Odoras je homo! Jes, alproksimiĝis soldatoj. La patrino vulpo kun konfuzo kolektis velkitajn branĉojn kaj foliojn, kaj ŝirmis la etulinon per tiuj. Ŝi kaŝis ankaŭ sin mem malantaŭ la bambuetaro. Kjen! Kun unu akra bojo la patra vulpo elsaltis intence en la direkto al la homo odoro. Plurfoje eĥis venis. Ununura eblo por la postlasita patrino vulpo estis nur portadi nutraĵon al la etulino. Trenante la vunditan kruron, patrino vulpo portadis nutraĵon eĥ en ventaj tagoj aŭ neĝpluvaj tagoj. Eknegiĝis. Por la patrino vulpo estis dolorige nun eĥ paŝadi. Ŝi apenaŭ trovis aŭ nukson aŭ etan insekton. La tuta ĉirkaŭaĵo tute blankiĝis de neĝo. La etulino malfermetis siajn okulojn. Neĝeroj flinte falantaj el la ĉielo ŝajnis al ŝi kvazaŭ tremantaj petaloj de vulp-primoloj. La patrino vulpo venis apud la etulinon, kaj ŝirmis ŝin per la tufa vosto. Etulino sentis sin varmiĝinta tra la tuta korpo kaj iĝis dormema. Neĝo falis senĉese, kaj pli kaj pli amasiĝis sur la patrino kaj etulino.

Ĉesis neĝi. Alfluis maso da glaciblokoj plene ĉirkaŭ la insuleto, kaj grandaj marleonoj ludis libere sur ili. Baldaŭ poste, kiam densa nebulo kovris la tutan insuleton, la glaciblokoj ien forfluis. Ja venis printempo. Hepatiko, leontodo, violoj kaj merizarboj samtempe ekfloris. Floros ankaŭ vulp-primoloj tre baldaŭ. Malgraŭ tio, la avo kaj avino ne revenis al la insuleto. Tial, ke la milito pli kaj pli furioziĝis. Finfine ĉesis la milito, kaj pasis printempo plurfoje.

Tun tagon, ŝipeto alvenis la marbordon. La avo kaj avino tute maljuniĝintaj nun vizitis la insuleton. - "Estas malofte, ke tiel amase floras vulp-primoloj". Kun miro ili skuetis siajn kapojn. - "Kara ĵizo, kara ĵizo, nur nun ni revenas antaŭ vin". "Kiel fartas la etulino?"

La avo kaj avino trovis vulp-primolojn grupe florantaj apud la betularbaro. Floradis granda grupo kaj malpli granda grupo flanko ĉe flanko. Ŝajnis al ili kvazaŭ la patrino vulpo kaj la etulino sidus unu apud la alia. Apud la malpli granda grupo de floroj kuŝis tute rustinta ĉeno. Kaj floris unu ruĝa floreto simile al la ruĝa rubando. Nur la koloroj de la ĉielo kaj la maro neniom ŝanĝiĝis de la iamaj. La avo kaj la avino staris senmovaj sur la monteto dum longa tempo.



Tiu ĉi belega rakonto por infanoj, estis eldonita de la eldonejo Kin-no-Hosi-Sya, en Nagoja (Japanio) en 1979, okaze de Internacia Jaro de la Infanoj. La libro, bele prezentita, estis mirinde ilustrita de la aŭtoro, Takahasi Hiroyuki (verkisto kaj direktisto de bildolibroj, prezidanto de "Hati Pro", idean centron pri bildolibroj). La tradukinto, Niwa Masahisa, estas Vicdelegito de UEA en Nagoja kaj Konsilanto de Japana Esperanto-Instituto. Al ili ambaŭ, ni tre kore dankas la permeson publikigi ĝin en "NIA VOĈO".

-oooooooooooooooo-

HISPANAJ KANZONOJ POR INFANOJ

Mi volus esti alta...

Mi volus esti alta kiel la luno,
Aj, aj, kiel la luno
kiel la luno!
Por vidi la soldatojn de Kataluno
Aj, aj, de Kataluno
de Kataluno!
De Katalun' mi venas, servis mi la Reĝ'
aj, aj!, servis mi la Reĝ'
servis mi la Reĝ';
permeson al mi donis mia kolonel'
aj, aj, mia kolonel',
mia kolonel'.
Pasante l'rivereto de Sankta Karlo
aj, aj! de Sankta Karlo,
de Sankta Karlo,
faligis mian ringon sube de l'akvo
aj, aj!, sube de l'akvo,
sube de l'akvo.
Serĉante mian ringon, kion trovis mi?
aj, aj!, kion trovis mi?
kion trovis mi?,
Arĝenta Virgulino kun ora Infanin'
aj, aj! kun ora Infanin'
kun ora Infanin'.

La lanternoj de l'Palaco

La lanternoj de l'Palaco
preskaŭ mortigas pro rido
vidante la studentojn
kun kravat' kaj sen ĉemizo.
Aj, ĉungalakalakaĉunga
aj, ĉungalakalakaĉon
aj, ĉungala kiel mi ridas
per la tuta mia kor'.
De la kapo ĝis la piedoj
mi vestis unu birdeton
por ke ĝi povus promeni
kun kravat' kaj sen ĉapelo.
Aj, ĉungalakalakaĉunga
k.t.p.
Oni diras, ke ĝi falas
turo kiu estas en Piso,
sed mi pensas, ke ĝi lamas
kaj klinigas dum vojiro.
Aj, ĉungalakalakaĉunga
k.t.p.
Mia najbarin' funebras
ĉar sia kato estas morta,
mi diras, ke nigra tuko
estas pli malmultekosta.
Aj, ĉungalakalakaĉunga
k.t.p.

ELEGIO DE JORGE MANRIQUE JE LA MORTO

DE LIA PATRO

(daŭrigado kaj fino de la antaŭa numero)

"La ekzisto neperea
ne sin donas al la grego
sen aŭstero
nek al homo mond-obeo,
kiun tiras ĉiu peko
al infero.

Sed la religiaj viroj
gajnas ĝin per multaj ploroj
kaj bedaŭroj,
kaj la famaj kavaliroj
per suferoj kaj laboroj
kontraŭ maŭroj."

"Kaj ĉar vi, alta nobelo,
verŝis sangon de berbero
kaj pagano,
vin atendas la ĉielo,
kiun gajnis vi sur tero
per la mano.

Kaj en tiu ĉi konfido
jam ekiru kun konvinko
tre preciza,
ke vi portos via fido
al la tria vivo-tingo:
paradiza.

PREGO DE DON RODRIGO
AL LA MORTO

"Ĉi ekzisto de mizero
tiom nun indiferentas,
estas tia,
ke mi diras kun sincero:
mia volo ja konsentas
kun la dia,

kaj pri l' fino ne angoras.
Pura-kora kaj senvorta
mi ne plendas,
ĉar se viro vivi volas,
kiam Di' lin volas morta,
li ekscentras".

"Kiu, pro malbono nia,
ŝanĝis sin je vir' servuta
kaj sub nomo;
kiu, kun esenco dia,
ligis sin al tio brutata,
al la homo;
kiu al la turmentado
sin submetis dolor-ŝvite
en persono,
al mi donu pro kompatado,
ĉar mi vivis senmerite,
la pardonon".

FINO

Kaj tiele, en trankvilo,
en perfekta mens-normalo
ĝis la fino,
ĉirkaŭate de la filoj,
de la fratoj kaj vasaloj
kaj edzino,
li de l' korpo sin deprenis
kaj, jam en la mond' alia,
Dion gloris.
Kvankan li en morton venis;
ĉe ni la memoro lia
nin konsolas.

(1442?-1478)

(El la hispana trad. FERNANDO DE DIEGO)

oooOooo

SENPAĜA NUMERO DE "HEROLDO DE ESPERANTO"!

Komence de Septembro aperos speciala duobla ilustrita numero de "HEROLDO DE ESPERANTO", entute dediĉita al la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno.

La numero enhavos detalajn raportojn kun bildoj pri la kongresaj laboraj, kulturaj kaj distraj programoj, intervjuoj kun la ĉefaj kongresaj figuroj, same kiel raportojn pri la aliaj manifestacioj: Junulara Kongreso en Loveno, Infana Kongreseto, Blindula Kongreso, ktp.

Ĉiuj interesigantoj povas peti senpagan ekzempleron de tiu kongresa numero al la redakcio: "Heroldo de Esperanto", Calle de Juan Ramón Jimenez, 28, 6^oA, Madrid 16, Hispanio.

oooOooo

MALMULTEKOSTAJ INTERESAJ LIBROJ

Sendu 100 ptojn. (eĉ interne de koverto) kaj vi ricevos sen alia elspezo la jenajn librojn:

- "Kampuĉio, nigraj tagoj", 153 paĝoj.
- "Vjetnamaj-ĉinaj rilatoj, dum la 30 lastaj jaroj"

Mendoj al: S-ro Luis Serrano Perez, Font Nova, 32 - SABADELL.

VIVO DE NIA LICEO

Tra la parentezo de la somero, nia Liceo reprenas sian normalan vivon kaj aktivecon. Sed, por nenio forgesi, ni devas iom memori la plej gravajn okazintaĵojn de la pasintaj monatoj. La monato Julio estis certe "ŝargita" je gravaj esperantaj eventoj. Unue, de la 8-a ĝis la 10-a, en la sidejo de nia Liceo okazis la INTERNACIA SIMPOZIO PRI "LA SPORTO EN LA MODERNA SOCIO" al kiu, eminentaj esperantistoj kiel D-ro DENOEL (Belgio), D-ro TORTEL (Francio), S-ro TOLA (Italio), D-rino M.R. URUEÑA (Prezidantino de HEF), kaj Mag. DOBRZYNSKI (Pollando), alportis interesajn prelegojn, kiuj jam aperas kolektitaj en libro eldonita de Madrida Esperanto Liceo.

Poste, de la 18-a ĝis la 22-a, okazis en Malaga la 42-a Hispana Kongreso de Esperanto, kie ankaŭ multaj "MEL-anoj" ĉeestis. Kaj, ĉe la fino, de la 24-a ĝis la 31-a, okazis en Antverpeno (Belgio) la 67-a UNIVERSALA KONGRESO en kiu nia Liceo estis reprezentita, krome de la gvidanto de nia "konversacia rondo" Gian Karlo FIGHIERA kaj de la nelacebla redaktorino de HEROLDO, Ada FIGHIERA-SIKORSKA, de la "MEL-anoj" GONZALEZ ABOJN, F.-ARROYO kaj L. DE JUAN. En tiu UK de Antverpeno, nia samideano Pepe F. ARROYO projekciis sian filmon "Esperanto vojaĝas tra Japanio", kadre de la faka kunveno de ILEF. Ankaŭ en la lastaj tagoj, ĉeestis la fermo de la UK la Prezidanto de nia Liceo Augusto CASQUERO, la Vizprezidanto Juan Carlos Ruiz, la Prezidanto de HEJS, Miguel Angel SANCHO, nia Sekretarino Alicia BALLESTER, nia kasiso J. Ramón L. TEJERINA kaj aliaj liceanoj, kiuj karavanis al Belgio por ĉeesti la UNIVERSALA KONGRESO DE TEJO, kiu okazis en la belega urbo LOVENO dum la unua semajno de Septembro.

VIZITIS NIAN LICEON

La 21-a de Julio vizitis nin S-ro D-ro HARADA, Prezidando de Okayama Esperanto-Societo kaj sia edzino Husako; antaŭ ĉeesti la UK, ili vojaĝis vizitante kelkajn eŭropajn urbojn. - La 9-a Septembro, la Prezidanto de TEJO S-ro Emri Wandel kaj sia edzino, Gila Wandel, el Israelo, kiuj, post la UK vojaĝadis tra Eŭropo. S-ro WANDEL prelegis kaj projekciis interesajn lumbildojn pri la kongresoj en Antverpeno kaj Loveno.

KONKURSO DE SLOGANOJ

Organizita de HISPANA ESPERANTA JUNULARA SEKCIO (HEJS) - BAZOJ: 1) Grandece: la slogano ne enhavu pli ol 20 vortojn. 2) TEMO: Propagando de Esperanto al la junularo. Helpallogo de plenkreskuloj al la junulara E-movado. Generala propagando de HEJS. 3) LINGVO: Ĝi estu redaktita en Esperanto. 4) DATLIMO: la 5-a de Marto de 1983. 5) PREZENTO: La slogano prezentiĝu tajpe aŭ preslitere en duonfolio. Pseŭdonimo aperu sube. Aparte estu koverto kun enmetita papero informanta pri vera nomo kaj adreso de la aŭtoro. En la koverto mem estu skribita la pseŭdonimo. 6) Pluraj sloganoj devas esti aparte senditaj. 7) JUGANTARO: Tripersona, elektita de la prezidanto de HEJS. 8) PREMIDONO: Dum la VIII HEJS-tendaro okazonta en la Esperanto-Oazo, Gandia (Valencia), Paskon 1983. SENDU AL: Hispana Esperanto Junularo, c/ Atocha, 98, Madrid-12, Hispanio.

UNUA EKSTERLANDAN PROVOJAGON;

Aranĝas novbakitaj Esperantistoj el Sud-okcidenta Francujo, al JACA, Aragón, Hispanio, la 16-a-17-a de Oktobro en Junul-domo, Calle del Arco, 1 - Tuj ekriatigu al J. Decobert, 45 Av. Béziou, F64140 Billere, Francio.

KRISTNASKA LOTERIO!!!!

Jam estas, disvendintaj ĉe la Liceo, biletojn por la Kristnaska Loterio. Ĉijare, la numero, laŭ la "savantoj" kaj la "parasikologoj" estas belega por atingi la unuan premion. Jen la numero:

57.721

La biletoj kostas po 100 Pesetoj. Aĉetu ilin antaŭ ili elĉer-

Laŭ ni scias per broŝuro disdonita de la SPARKASO PROVINCA DE MURCIO en CARTAGENO, tiu ĉi organizaĵo komencis instrui Esperantojn kursojn (bazajn kaj perfektigajn) en Cartegeno urbo kaj vilaĝoj proksimaj. La broŝuro klarigas ĉion rilate al la internacia lingvo kaj instigas la homoj partopreni en tiuj ĉi kursoj.

Ce la fino, ĝi mencias la frazon de Francisco Pi y Margall:

"Ni, kiuj tiel multe ŝatus vidi, faligitaj, ĉiuj la landlimoj de la popoloj, ne hezitas rekomendi la studon de ESPERANTO al ĉiuj homoj koraj kaj inteligentaj, kiuj vere amas la moralan kaj intelektan progreson de la popoloj."

Ni, ekde la paĝoj de "NIA VOĈO" kaj ekde niaj plej profundaj esperantaj sentoj, bonbenigas tiun decidon kaj kore deziras abundajn fruktojn.

oooooooo00000000oooooooo

DU POEMOJ

NUR MIGRI, ĈIAM MIGRI, MIGRI FOR

Nur migri, ĉiam migri, migri for,
postlasi ĉie iom el la kor',
al hejm' sopiri ekster hejma ter',
sed hejme sklave revii pri liber',
kaj ree kuri for ĝis spira halt'
de ombra fundo al sunriĉa alt';
jen vivo mia: migro kaj sopir'...
Celperda halto kaj celserĉa ir'.

Forviŝi fremdan larmon per konsol',
sed lasi flui propran en la sol'
kaj arlekeni kun kaŝita larm'
por senti korkareson de korvarm',
dividi min kun donacema sent'
kaj poste vei pro l'malfrua pent';
jen sorto mia: dono kaj ricev'...
Semado vana kaj senfrukta rev'.

Al mi nur vortoj ŝajnas ĉio jam:
ideo, celo, bono, vero, am'...
Mi scias, ke la tuta glora mond'
nur estas en dezerto seka font'.

J. Baghy

AL NI GENEZ' PROKLAMAS

Al ni Genez' proklamas
la Homon l'Eternulo
laŭ propra bildo kreis
el materia nulo.

Sed Nietzsche disanoncas
ke l'Homo estas Ponto
liganta Superhomon
kun animala fonto.

Cu pravas jen' aŭ jeno
al mi indiferentas,
mi estas via frato,
kun via sang' identas.

Ekruĝas mia vango,
se krudas ago via,
sed fidon mi ne perdas
pri mondo familia,

ĉar legas mi konsole
en la okuloj puraj
de mia filo kara
pri ecoj disnaturaj.

B. Ragnarsson

SENTENCOJ DE SALOMONO

Jen estas sep aferoj, kiujn la Eternulo abomenegas:

Arogantaj okuloj
Mensogema lango
kaj manoj, kiuj verŝas senkulpan sangon
Koro, kiu preparas malbonfarajn intencojn
Piedoj, kiu rapidas kuri al malbono
Falsa atestanto, kiu elspiras mensogojn
kaj tiu, kiu semas malpacon inter fratoj.

El la hebrea originalo tradukis L.L. Zamenhof

Ni daŭrigas en tiu ĉi numero la "konsilojn pri stilo" elĉerpitajn el la libro de F. Faulhaber "NE TIEL, SED TIEL ĈI!", pensante, ke ili povas esti utilaj kaj klarigantaj por tiuj kiuj deziras perfektigi sian esperantan stilon.

Oni evitu ankaŭ komenci kelkajn sinsekvajn frazojn per la samaj aŭ similsonaj vortoj, ekz.:

S.A.T. eldonas ĉiumonatan gazeton S.A.T. eldonas ĉiumonate gazaton
 "Sennaciulo" kaj ĉiujare jarlibron "Sennaciulo" kaj ĉiujare jarlibron
 kun la adresoj de la membroj. S.A.T. kun la adresoj de la membroj. Ĝi ha-
 havas ĉiujare sian kongreson. vas en ĉiu jaro sian kongreson.
 Ĉar la unua frazo komenciĝas per "S.A.T.", oni komencu la duan per Ĝi.
 Laŭ ebloj kiuj prezentigas por tio, oni povas eviti malbele sonantajn ri-
 petigojn kaj rimojn:

- a) donante al la koncernaj vortoj alian lokon, kie ili ne ricevas akcenton;
- b) anstataŭigante ilin per sinonimoj;
- c) forigante ilin.

La sekvanta tasko nun verŝajne ne prezentas gravajn malfacilaĵojn:

<p>A - Ne tiel....</p> <p>La ĉefo eniris kaj diris...</p> <p>Ciuj skatoloj enhavis la saman enha- von,</p> <p>La knabino volis rezonadi kun plena- ĝuloj, kvazaŭ ili estus siaj samaĝu- loj.</p> <p>Nur kiam jam tagiĝis, la vetero re- trankviliĝis kaj la dormo, kvankam mallonga, ŝin refreŝigis.</p>	<p>B sed tiel ĉi.</p> <p>(iris - diris): La ĉefo eniris diran- te...; aŭ: Enirinte la ĉefo diris...</p> <p>(enhav- enhav): Ĉiuj skatoloj enha- vis la samon.</p> <p>(aĝuloj-aĝuloj): La knabino volis re- zonadi kun maturaj homoj, kvazaŭ ili estus ŝiaj samaĝuloj.</p> <p>(iĝis, -iĝis, -igis): Nur kiam jam tagiĝis, la vetero iĝis ree trankvi- la kaj la dormo, kvankam mallonga, refreŝigis ŝin.</p>
--	---

3. Bona stilo estas klara.

a. Konvencia vortordo.

Klarecon, facilan komprenon, oni akiras ĉefe, obeante la konvencion, t.e. la kutimojn pri vortordo kaj esprimmaniero.
 La sekvantaj tekstoj en kolono A eble ne vekos vian indignon, sed la sulko sur via frunto verŝajne restos:

<p>A - Ne tiel...</p> <p>Tie la patrino la naskigon de tiu ĉi unua kaj lasta infano atendis.</p> <p>La letero al li estis voĉe legata.</p> <p>Mi de vi postulas, ke vi ne parolu pri tio, kion mi ĵus al vi komisiis.</p> <p>Mi por vi estis obstaklo, kiu al vi malebligis serĉi pli bonan estontecon.</p> <p>Li tuj foriris al la urbocentro por tie en la grandaj trinkejoj, muzikejoj kaj dancejoj esplorigardi.</p>	<p>B sed tiel ĉi.</p> <p>Tie la patrino atendis la naskigon de tiu ĉi unua kaj lasta infano...</p> <p>La letero estis voĉe legata al li.</p> <p>Mi postulas, ke vi ne parolu pri tio, kion mi ĵus komisiis al vi.</p> <p>Mi estis por vi obstaklo, kiu malebligis al vi serĉi bonan estontecon.</p> <p>Li tuj foriris al la centro de la urbo por tie explore rigardi en la grandaj trinkejoj, muziksalonoj kaj dancejoj.</p>
--	---

Nia Voco

ORGANO DE MADRIDA ESPERANTO LICEO

Decembro 1982 - Januaro 1983



FELIĈAN KRISTNASKON
KAJ
NOVAN JARON 1983

MADRIDA
ESPERANTO
LICEO

c/ Atocha, 98
Madrid, 12 - Hispanio
Tel. 230 87 98

La ŝango! Lastatempe oni multe parolas pri la ŝango. Subite, tiu vorto akiras specialan nuacon, kvazaŭ magian aŭ rivelitan signifon, gravan sonon de tute nova vorto. Jes, dum longa tempo, ŝajne, ni forgesis tiun normalan kaj naturan leĝon: ĉio nature ŝanĝas, pli-malpli senaverte, eĉ se oni strebas por ĉion subteni nealiigebla, nevariebla. Sed estas ĝuste tia la nova senco de la vorto: la ŝango nun ne devas okazi senaverte, estas ni, kiuj devas fari la ŝangon, kiuj devas orientigi niajn sistemojn, niajn rutinajn vojojn, niajn trouzitajn regulojn, maniere ke ni trovu novajn kaj plej brilajn rezultojn.

Jes, la ŝango, grava afero. Estas bone, ke oni revigligi tiun vorton por nin eltiri de jam tro longa monotonio. Ĝi signifas paŝon nataŭen en la vojo de la progreso kaj la perfektigado, kiam ĝi estas farita rekte kaj celante al plibonigo.

En tiu ĉi senco, ankaŭ ni bezonas ŝangon kaj ni devas komenci per ni mem. Ni devas komenci forgesante - almenaŭ iomete -, nian malnovan kaj fundradikitan egoismon, tiun teruran malamikon de la kolektiva progreso. Ni devas komenci alkutimiĝi pensi, ke la nia estas kolektiva, kooperativa tasko. La personaj agadoj, ofte nur donas malgrandajn fruktojn, mizerajn rezultojn. Des pli granda la entrepreno, ju pli ĝi postulas kolektivajn strebon. Kaj nia LICEO deziras plenumi grandan kaj gravan taskon en la kampo de la esperanta laboro.

Pro tio, mi ne laciĝos alvoki vin foje kaj refoje, esperante, ke iun tagon, vi aŭdu min kaj revenu. Estas senutile fari interesajn planojn, belegajn projektojn, se ni ne havas homojn por ilin plenumi kaj realigi. Mi jam scias, ke neniu el ni povas ĉion doni, sed se estas multaj, kiuj iom donas, multe oni povos fari.

Tamen, mi min demandas: ĉu estas tiel malfacile trovi kelkajn el vi pretajn je doni iomete por helpi nian Liceon por plej bone plenumi ĝian taskon, por plej efike realigi ĝiajn projektojn? Jam de longe, ni deziras organizi teatran grupon por munti kaj reprezentante teatraĵojn el nia riĉabunda drama literaturo en Esperanto; ankaŭ de longe ni deziris formi muzikan grupon, por kanti kaj sonbendigi esperantajn kanzonojn; ni intencis formi laborgrupojn por realigi diversajn aliajn projektojn, kiel ekzemple, fari propagandan prelegojn en lernejoj, programon de aktivadoj por la Liceo, prepari kaj sonbendigi E-kursojn; kaj tiel multajn aliajn proponojn... Sed, por tion fari, oni bezonas, nepre oni bezonas homojn..., kaj ni estas, bedaŭrinde, tro malmultaj.

Jes, ŝangon, tion ni absolute bezonas: ŝangon en nia Liceo kaj ŝangon en niaj personaj sintenoj. Ni devas fari nian Liceon vigla kaj vivanta klubejo por ĉiuj membroj kaj gelernantoj, amika hejmo por ĉiuj, ĝoja kolektivo en kiu estos loko kaj laboro por ĉiu, kiu sincere dezirus kunlabori pri la disvastigado de nia Lingvo.

Kaj pro tio, mi denove petas al vi, se vi legas tiu ĉi paĝon (kaj ĝuste nun, mi min demandas: ĉu estas iu, kiu vere legas tiun ĉi revueton, kiun ni tiel ame kaj pene preparas por vi?), se vi vere legas tiun "NIA VOĈO"-n, bonvolu respondi, bonvolu fari al ni aŭdi ankaŭvian voĉon, por ke ni sciu, ke vi estas kun ni, ke ni ne estas solaj, ke, eble, ni povas esperi pri nian kaj vian ŝangon.

Jes, la ŝango: grava, interesa vorto. Eble la vivo estas ŝango, ĉu ne?....

Varmosento ĉe la radiatoro. Kvazaŭ hundido apud fajro mi buliĝas, endormiĝas, neniĝas iom post iom en konfuzan plezurigan nebulecon. Ŝvit! Jen la unua ŝvitero el ĝuo, trairanta mian tutan internan universon. Ajna brueto, ajna lumŝanĝo en la ĉeĵo, eĉ la plej sensignifa movo el ĉirkaŭstarantaj estaĵoj sufiĉas por sproni min; mi vekigeblas, milde ekrigardas ien kaj tuj miaj palpebroj ekiras reen malrapide, tute malrapide; des pli, ĉar dum la irado estiĝas novaj ĝuoj, kvietigaj sentoj, kunfluontaj en plenan pacon, nome dormon.

Kaj mi ekdormas. Venas al mi bildoj de vi, mia karaga amitino, disfloranta en nemombreblajn volupterojn; vi, neforgesebla kunulino dum miaj angoraj tagoj, kaj mi vin resonas en mia sonĝo, naive, por vin senti pli apuda, pli reala.

Traterata!, la infanaĝa trumpeto starigas sablajn kastelojn, kantojn ĉe la eknoktiĝo, gumsoldatojn, indianajn plumojn. Tuta kosmo alvenas en anara bilda sinsekvo. Mia kvartalo. Unuavice, per gaja bojado, gvidante miaj firmajn paŝojn al ŝtona batalo, "Cinamo" supreniras sur deklivan pavimitan mallarĝan strateton kaj la tuta sorĉaĵo de la krepusko disfalas sur nian infanbandon, sur fruktoĝardenojn kaj terasojn.

Kokeriko, la krio de la koko super sonorilturojn kaj ventmontrilojn. Ĵus venis la Tri Reĝoj kun ĉevaloj el kartono por la bonaj infanoj. "Cinamo" kuras ĉirkaŭ neĝo-statuon.

- He, "Cinamo"! Donu al mi la manon.

Kaj "Cinamo" obeeme turnas sin al la vokanta bubo, preta plenumi ĝian peton. Fulmotondras. Trovinte viajn lipojn transe de pluva kurteno, mia buŝo ellasas kisojn, kiuj forflugas sur ilin, kvazaŭ sopiranta kolombo.

Fulmotondras plue. Nun ni krevas en la konusa lumo de stratlanterno, sed niaj bildoj svenas, ŝimas. Ĉio kristaliĝas. Post momento ventego trenas foliojn kaj kisojn. Ĉion. La angoro de la nenieco estas tiom peza, ke mi anhelanta preskaŭ vekigeblas.

Bruliga somera venteto flirtas inter la bubaroj, swinganta trempitajn krudpaperojn, kiuj baldaŭ estos ĵetataj kontraŭ la dormemajn vespojn ĉe la defluo de la dekliva strato. Kompatindaj vespoj! Miĉjo krias plengorge:

- He, vidu! Jen la deka en mia vesparo.

Unue oni mane kaptas ĝin el la krudpapero, zorge, zorgege, evitante ĉian danĝeran nekontrolitan movon de ĝia abdomeno, poste oni deŝiras al ĝi la pikilon kaj jen ĝi estas kvazaŭ kastrita ĉevalo, senverna paĝo de preskaŭ sensignifa historio. Malgrandegan spliton oni penetrigas en ĝian abdomenon stumpon, eble celante estetikan anstataŭon, eble nenial, kiu tion povus scii?

Ĝia malgrasega gracia talio aperas nun en nodo de blanka fadeno. Ĝi timeme flugetas, sed ĝia malliberigilo permesas al ĝi nur malvastan flugadon super la kapo de la bubo, tenanta faskon de dek fadenoj en sia mano.

Miĉjo alproksimiĝas, turnas sin al mi. Lia kapo kreskas, kreskadas ĝis ĝi finfine okupas mian tutan vidkampon. Liaj enormaj okuloj rigardadas al mi fikse en la radiko mem de mia animo. Liaj okuloj, liaj pupiloj, lia interna nigro... Terura rikano eksplodas, kaptas min en riproĉan mondon, kie pluraj dekoj da kripligitaj vespoj zumas kompatindajn veojn.

Mi turniĝadas sur mia lito ĉe la radiatoro. Du hundoj bojas malproksime, tre malproksime, apud la marbordo. Ekvesperiĝas. Arĝentaj littukoj kovras la haŭton de la maro, lekas la plandojn de la strando, petoleme, ameme, kvazaŭ celante la intermiksiĝon kun ĝi, kun la tutaĵo.

De la multkolora horizonto venas al ni grapolojn da amoj, kiuj disverŝiĝas sur niaj korpoj, ĉe ĉiu iro kaj reveno en la perfektan ĝojon.

Kaj mi vekigeblas, ŝaltas la lampon; malrapide mi malfermas miajn okulojn kaj karesas per ekrigardo la ĉirkaŭstarantajn objektojn. La tria kaj duono. Restas ankoraŭ tri horoj ĝis la ellitiĝo. Mi do revenas sur la vojon de miaj sonĝoj, tiel miaj, kiel la vekhorloĝo aŭ la bildoj sur la muro aŭ la libroj en la libroŝranko, kaj mi dormadas.

NIAJ GELEERNANTOJ KUNLABORAS!

Ni estas kontentaj, eĉ entuziasme feliĉaj!! Niaj gelernantoj, finfine kuraĝas kunlabori en 'NIA VOĈO"! Ni tute sincere dankas kaj gratulas ilin kaj, por vere montri iliajn lerno-nivelon, ni publikigas iliajn verkojn tiel kiel ili estis verkitaĵoj kaj nur kun la oportunaj korektaĵoj (inter krampoj) fari-taj de la instruisto. Vidu, vidu kiel bone kaj talente ili verkas!

ESPERANTO NE ESTAS NUR LINGVO

Estis ie kvar mirindaj gejunuloj. (Ĉu mirindaj? Ne!; mirindegaj).

Jen ni estis. La vento fajfis, la pluvego batis niaj (n) vizaĝoj (n), ruĝaj la manoj pro la malvarmega vetero...

- Kio estas tio?, mi diris.

- Kia lumo!, ekkriis unu el aliaj.

- Miauuuon! (Miaŭ!), oni aŭdis nokte. Terure ni antaŭeniris.

- Ni marŝu, ni marŝu!!!

- Tie io moviĝas!

-Ho teruro!!, estas la pordistina kato!! Ho terurego!

Ni suprenkuris per la ŝtuparo; ni alvenis ĝis la kvara etaĝo.

- Tie ĉi estas la lumo, kiun ni vidis malsupre. Trake (ĉ?--sufoke?)ni piediris sur koridora kahelo. Jen estis la luma deveno: Ĝi estis la Esperanta Stelo.

- Ho!, mi diris.

- Ho!, unu el aliaj ekkrietis.

-Ho! Ho!!!, ĉiuj ni ekkriegis. Ĝi estas la homara unueca stelo!

Nun, ci jam povas ekaplaŭdi, Miĉjo. Plas, plas, plas!! Brave, brave!!

Subskribita: Kolektivo el gelernantoj

Julio, Raquel, Elena, Eva.

ooooOoooo

KIEL FARI PACON EN LA MONDO

Se mi havus sufiĉan povon mi klopodus konstrui plu (i) justa(n) socio(n) en kiu povus regni amo kaj paco. Estas facile altrudi pacon per militaj armiloj, sed estas fiktiva paco kiu mallonge daŭras. Por longdaŭra paco ni devas disvolvi(gi) aro(n) da agadoj kiel eble malplej malutilaj kaj malrapidaj.

Rilate al tempo, mi dividus la daŭron je du periodoj:

1) Eduka periodo 2) Periodo de ŝanĝo kaj alĝustigo.

La unua periodo (eduka periodo), longa je 23 jaroj, povas esti dividita je du fazoj: Fazo 1.- Longa je 5 jaroj, kie la ĉefa tasko estas eduki la edukistoj(n) pri necesaj faktoroj por atingi mondpacon, kiel: a) amo, sen religia rilato, kiel natura forto aŭ vitala bezono; b) ekologio, ni devas inser-ti en la cerbo de edukistoj, ke la mondo estas kiel spacoŝipo kies ŝimpanoj ni mem estas; c) malcentralizeco (ado), rilate la ekonomio, la industrio, ktp; d) internacia lingvo, kiel Esperanto. - Fazo 2.- Longa je 18 jaroj, kie la ĉefa tasko estas eduki la infanoj per la edukistoj edukataj en la unua fazo. Tiu fazo havas du ŝtupojn: Ŝtupo 1: kiu daŭras de la naskiĝo ĝis 12 jaroj, lernantoj loĝas en ilia familia hejmo kaj la lernejoj devas esti malfora (apuda). Ŝtupo 2: kiu daŭras ĝis 18 jaroj, en tiu ŝtupo studentoj sole uzas Esperanton kaj ĉiu kurso okazigas en malsamaj nacioj. La kursojn formigas per sciencoj, neatencataj (neagresemaj) teknikoj, praktikaj laboroj, ktp. La dua periodo de ŝanĝo karakterizata per la sekvanta regulo:

"Sole ĉiu persono dece edukita havas rajton fari respondeĉulon de la publikaj vakantaj postenoj kiuj okazigas".

Verkanto: R. Nizo Feao - Dato 2.12.82

ooooOoooo

PRI LA INFANECO

Al mi estas malfacile pensi pri la infaneco ĝenerale, do, mi povas paroli pri la vivo de la infanoj kiujn mi konis kiam mi laboris en lernejo.

el la aferoj kiu(n) ĉiuj havas, kaj tiu estas tre grava, estas la imagpovo, sed la diferenco estas, ke iu havas pli ol la aliaj.

La infanoj, por fari iujn ajn aferojn metas sian imagpovon en akcio (agado), ekzemple por desegni, por ludi, por paroli, ktp. Kelkajn fojojn la plenaĝuloj ne komprenas tio (n) kaj faligas la mondon, kiun la infano estis kreita (kreis). Multajn fojojn mi estis impresata (ita) kiam iu infano, nur kun peco da modleblaĵo rakontis min (al mi) originalan historion. Mi enviis lin.

La problemo estas nun, ke la televido, la ludiloj ktp. bremsas (bridas) la imagpovon de la infanoj ĉar (tio) diras ilin en (pri) kio ili devas pensi, estas diri (tio estas), markas la vivon de la infano per determinita vojo kaj krome lin faras fortegan.

Parolante ankaŭ de (pri) perforto, ĝi estas tre ligita al la televidilo ĉar eĉ iuj desegnoj movigantaj (movbildoj) estas ŝarĝitaj de perforto, kiel, ekzemple "Mazinger 20", filmo kiu preskaŭ ĉiuj infanoj vidis; mi scias tion ĉar dum la tempo kiun mi laboris kun infanoj de kvar jaroj, preskaŭ ĉiutage ili kantis la literon de prezentacio (la teksto) de la filmo. Tio ankaŭ markas (frapas) la imagpovon de la infanoj per determinitaj lokoj (al difinitaj lokoj).

A.L.

oooooooooooo000000oooooooo

(Kiel oni povas konstati, la nombro de eraroj ne estas tro granda kaj la uzado de la lingvo estas ege bona. Tiuj gelernantoj apartenas al la perfektiga kurso. Ni sincere esperas kaj deziras, ke ili daŭrigu sian kunlaboron kun nia revueto kaj kuraĝigas ĉiuj gelernantoj sekvi la ekzemplon.)

DU POEMOJ PRO PACO

KIUJ VOLAS MILITON



Vokas sinjor' trans oceano
li kun pistol' en flanko pend'
ke li armez laŭ la plano:
atak' nuklea "por defend'".
La morton de la miliardoj
laŭ li valoras "libereco",
sed vidas ni al viaj karto, dankon sinjor', por ĉi komplez'!
El sub la masko kiu gvatas?
Krucitaj ostoj kaj krani',
por la homar' futur' misfata,
ĝin nepre ne sopiras ni.
Ne l'monposedaj mondon stiru,
sed la kredanta homlabor'
kaj ĝia paca kant' inspiru
senigi Tero je angor'.
Ne estos novaj Hiroŝimoj,
senhoma Ter' en agoni',
konkorde kaj sen bar' de limoj
se por la paco batalos ni!

Jiří Kořínek (El la revuo PACO)

PACO

Paĉjo, diru, kio estas paco?
Paco estas floranta herbejo,
odoranta senlima arbaro.
Paco estas kvietega maro,
plena da infanetoj lernejo.
Paco estas pano kun mielo,
ĉiutaga honesta laboro.
Paco estas, filo, via koro,
klarega kaj steloza ĉielo.
Paco estas ludoj sur la korto,
paco estas mortigita morto.

Jarke Pol



"ESPERANTO" KAJ ĜIA ELDONISTO

Sendube kaj bedaŭrinde la historio de la esperanto-movado en nia lando estas ne sufiĉe konata; ja ni bezonus trovi kompetentan fakulon kiu science kaj serioze pritraktu ĝin. Tamen, de tempo al tempo oni povas legi sur diversaj bultenoj aŭ revuoj disaj informoj pri la agado kaj klopodoj de enlandaj geesperantistoj. Un el tiuj esperantistoj kiu pioniris sur la vastiga kampo de Esperanto komence de la nuna jarcento estis ANDRES BRAVO DEL BARRIO.

El la Enciklopedio de Esperanto ni ĉerpas sekvajn informojn (por la hispana parto kunlaboris FRANCISCO AZORIN, el Cordoba; JUAN A. BARCELO, el Palma de Mallorca; ANDRES PINO, el Valencia; kaj speciale FERNANDO REDONDO ITUARTE kaj JOSE ANGLADA).

ANDRES BRAVO DEL BARRIO eldonis la unuan revueton en nia lando, nomata "ESPERANTO". Ĝi estis eldonata en Santander kun subtitolo "Revista Mensual Ibero-Americana", dum marto-oktobro 1902 (laŭ Bibliografio de Internacia Lingvo, de STOJAN, 1903) kun 16 paĝoj, 22 x 16 cm. En tiu revuo kunlaboris ankaŭ la unua esperantisto de Katalunio, JOSEP VIDAL LLOPART, el Vilanova i Geltru. Li ne nur estis redaktoro de tiu gazeto, sed ankaŭ la unua esperantisto en Santander. Poste, ŝajne, li translokiĝis en Madridon kaj tie li starigis en societo "Fomento de las Artes" fakon "Sekcio Internacia Esperanta!"

Kune kun RICARDO CODORNIU, Fernando Redondo kaj aliaj, li starigis en 1907, ankaŭ en Madrido, "Centra Esperantista Grupo". Poste li aliĝis al Ido. Sed ankoraŭ multaj faktoj pri lia vivo kaj agado restas nekonataj. Personoj kiuj eble konis lin estas malfacile troveblaj. Mi klopodis koni tiun supreme menciitan revueton, sed ĝi ne troviĝas nek en Biblioteko Hodler de UEA, nek ankaŭ en la plej grava kolekto de nia lando, tiu de Hispana Esperanto Muzeo (privata kolekto kies direktoro, prizorganto kaj ĉionpova aganto estas S-ro LUIS M^a HERNANDEZ YZAL). Ja, mi kore dankos kiu ajn informon kiu helpos al mi kompletigi suprajn notojn. Kiu povas helpi?

Juan AZCUENAGA VIERNA

ALIA KURIOZAĴO PRI LA TEMO

Ĉar mi estas nova esperantisto kaj ne tro multe scias pri la historio de la esperanto-movado, mi ne povas certe diri, ĉu S-ro AZCUENAGA pravas, kiam li bedaŭras pri la nesufiĉa kono je tiu ĉi historio rilate al nia lando. Kaj mi diras tion ĉar, foliumante la HISTORIO DE ESPERANTO de Leon Courtinat, en la volumo III, jaroj 1934-1960, mi trovis ion, kiu ŝajnis al mi kurioza. En la paĝo 1272, mi legis la jenan nekrologon pri grava hispana esperantisto: "Jozefo PEROGORDO.- Mortis 92 jara, 3/5/62. Li estis unu el la pioniroj de la hispana aviadistaro. Artileria generalo, militista aviadisto. Jam de junaj jaroj li estis tre fervora Esp. kaj li ĉeestis multajn kongresojn. Komisiite de la hispana registaro, li surmetis la grandan kolringon de Isabel la Katolica, plej alta honoro por civilaj meritoj en Hispanio al D-ro Zamenhof dum la Antverpena Kongreso en 1911. Prez. de la E. Grupo en Madrid. Li estis talenta kaj bonkora samideano."

Sed, kio estis por mi vere surprizinda estis, ke, post atenta tralegado je ĉio rilate al la SEPA KONGRESO, Antverpeno 1911, en la I volumo de la sama Historio de Esperanto (paĝoj 315 ĝis la 339), mi nenion trovis nek pri S-ro Perogordo, nek pri lia surmetado al D-ro Zamenhof de tia grava kaj fama honora ordeno.

Kio, do, tio signifas? Ĉu la historiisto ne konsideris sufiĉe grava la honorado? Ĉu li tute ne sciis pri ĝi? Ĉu la nekrologisto mistrafis la daton de la Kongreso?

Kion la hispana E-historio diras pri tio?

Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed Esperante; vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kauzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan. Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malŝraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke ili laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkintaj, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto...

(el Parolado en St. Petersburg. 1910)

oooooooooooooooo

6 -- MI REMEMORAS, KIEL VI ESTIS...

Pablo Neruda

Trad. J.F.Arcoy

Mi rememoras, kiel vi estis lastaŭne.
Vi estis beret griza kaj la koro en trankvilo.
Krepuskflamoj luktadis en la okuloj viaj
kaj folioj faladis ĉe l'akvon de via animo.

Algluita al miaj brakoj kiel la konvolvulo,
folioj kolektadis vian voĉon pac-lantan.
Fajraĵo de mirego kie mia soif' bruladis.
Dolĉa hiacinto blua sur mia anim' klinata.

Sentas mi viajn okulojn vojaĝi, aŭtun' forestas:
beret' griza, voĉ' birda kaj koro de la hejmo
al kie miaj profundaj anĝeloj elmigradis
kaj miaj kisoj faladis gajaj kiel brulpecoj.

Ĉielo ekde la ŝipo. Kamjo ekde la montoj:
via memor' estas luma, fuma, lageto kvietaj!
Transe viaj okuloj la krepuskoj bruladis.
Turnadis ĉe via animo aŭtunfolioj sekaĵ.

La Kursojn.— Komence de Oktobro, nia Liceo, kiel kutime, malfermis siajn diversajn kursojn, bazajn kaj perfektigajn, kaj estas menciinda, ke la "kvalito" de la gelernantoj estis ege bona kaj la nivelo de ili atingita estas vere remarkinda, kiel pruvas la bonaj finekzamenoj, kiujn ili faris.

La Zamenhofa Festo.— La 15-an de Decembro ni festis la 123-a datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof pere de brila Esperanta Akto okazigita en la sidejo de la Klubo de Amikoj de UNESCO de Madrido. La salono estis preskaŭ plena je ĉeestantoj. Post la malfermaj kaj salutaj vortoj de nia prezidanto, Aŭgusto Casquero, ankaŭ salutis la reprezentatoj de aliaj madridaj grupoj, nome tiu de la nova grupo "Ponto de Toledo". Ĝian-Karlo Fighiera, la konstanta gvidanto de nia "Konversacia Rondo", salutis en la nomo de la eksterlandaj esperantistoj kaj, dum sia mallonga parolado dediĉis laŭdajn vortojn al tiuj liceanoj, kiuj konstante, silente kaj efike laboras "ĉe l'ombro" pro la bona funkciado de nia Liceo kaj, kiel modesta homaĝo al ili ĉiuj, oferis malgrandan donacon al S-ino Alicia Ballester, kiu tiel mirinde faris kaj brodis la novan flagon de la Liceo. Poste, la gvidantoj de la kursoj disdonis la diplomojn al siaj gelernantoj kaj, sekve, nia juna prezidanto de HEJS, Miguel-Angel Sancho, lerte kaj trafe prelegis pri originala aspekto de la ligvproblemo. Fine, kaj antaŭ la kantado de la Licea Himno, nia estrarano José F. Arroyo projekciis novan filmon de la serio "Esperanto vojaĝas", ĉijare titolita "Tra Nordeŭropo", en kiu li montris al ni, krom la belegaj aspektoj de la landoj tra kiuj li vojaĝadis (Belgio, Nederlando, Danlando, Svedio, Norvegio kaj Germanio), interesajn sekvencojn pri la UK de Antverpeno kaj la TEJO Kongreso en Loveno.

Post tia agrabla kaj simpatia akto, ĉar jam estis tempon vespermanĝi, ni ĉiuj kune iris al apuda ĉina restoracio "Rio Grande" kie ni gustumis abundegankaj delicianĉinstilar vespermanĝon, malavare "akvumita" je bonaj naciaj vinoj.

Esperanta strato en Madrido .— Por nia Liceo kaj ankaŭ por la E-movado, estas grava, elstara novaĵo la ĵusa oficiala inaŭguro de nova strato kun la nomo "Calle Idioma Esperanto" (Strato Esperanto Lingvo). La 18-an de Decembro kaj kun la ĉeesto de la Konsilanto pri Kulturo, S-ro Luis Heras, reprezentante la aŭtoritatoj de la Madrida Komunumo, oni inaŭguris novkonstruitan straton ĉe nova kvartalo, kiu tiamaniere honoras la nomon de nia internacia lingvo Esperanto. La hispana akademiano kaj elstara esperantisto S-ro Francisco Azorin Poch faris la festparoladon kaj estis ege aplaŭdita de la komunumaj reprezentatoj kaj de la granda amaso de esperantistoj, simpatianoj kaj loĝantoj de la "esperanta" strato.

La komuna peto de nia Liceo kaj de la grupo HEF de Rodriguez de San Pedro, finfine donis tiun belegan frukton, kiu tiel multe ĝojas al ni ĉiuj.

ALVOKO POR ORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO.—

Kiel ĉiujare, la Liceo kunvokas ĉiuj membroj partopreni la ORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO, okazonta, kiel kutime, la lasta sabato de la monato Januaro, t.e., la 29-an Januaro de la venonta jaro 1983, en la Salono de nia sidejo, strato Atocha, 98, 4^o. La tagordo estos la jena:

- Lego kaj aprobo (ĉu konforma) de la antaŭjara Akto.
- Raporto pri ekonomia stato de la jaro 1982
- Elekto de nova straro
- Petoj kaj demandoj

Oni tre ege petas al ĉiuj membroj de la Liceo, nepre partopreni en tiu ĉi Ĝenerala Asembleo ĉar, krom la tagordaj aferoj, ni intencas aranĝi kaj proponi diversajn projektojn celante la revigligo kaj plej aktiva funkciado de nia centro, kiuj bezonas esti kune diskutataj.

Eksteraj aktivaĵoj.— Nia klubano Pepe Arroyo faris propagandan paroladon pri Esperanto kun projekciado de esperanta filmo, en la lernejo Santa Margarita Maria de Alakoke (Getafe), antaŭ pli ol cent gelernantoj kun iliaj instruistoj. La infanoj estis ege interesitaj pri la internacia lingvo kaj sencese

HISPANAJ KANZONOJ DE TUNA¹
(Adaptitaj de Juan Carlos Ruiz)

DIANTETOJ ("Clavelitos")

Por mia dianton knabin¹
sendu el via buŝeto
pri tio ne sentu vi
eĉ iomete da hontemo.

Se vi donacus al mi
la mielon de viaj lipoj
mi korespondus virin¹
per la plej bela tintilo.

(Rekantaĵo)

Diantetoj, diantetoj,
Diantetoj el amanta kor¹
Jen regalo, estas floro
same ruĝa kiel sanga roz¹

Se iun tagon, diantetojn
mi ne povus kumporti per vi,
ho!, ne kredis ke la am¹ finiĝis:
ne sukcesis mi je preni ĝin.

Tra-la-ra-la-ra...

Vespero en duonlum¹
vidis mi vian rideton
ne estas en Sankta Kruc¹
same aminda buŝeto.

Mian floron portis vi
en eleganta harplekto
rigardante tion mi
kredis vidi ĉieleron.

(Rekantaĵo)

*Studenta Universitata muzikistaro.
*Sankta Kruco: ĉefurbo de Tenerife
(Kanariaj Insuloj) kun granda tradi-
cia Universitato: La Laguna.

KANTU SEN PLORO ("Canta y no llores")

Birdeto forlasinta,
bela ĉielinjo, neston naskiĝan
ne rajtas koleriĝi
se, revenante, ĝi okupitas.

Aj, aj, ajaj, kantu sen ploro
ĉar dum kantado tre ĝojas
bela ĉielinjo, plej trista koro!

Tiun haŭtmakuleton
apud la lipoj kiun vi havas
gardu por mi rizerve, bela ĉielinjo
pri ĝi mi rajtas.

(Rekantaĵo, 2 foje)

El malluma montaro,
bela ĉielinjo, estas venantaj
viaj okuloj brunaj
kiuj, pri amo, ekkontrabandas.

CI TIUN HELAN NOKTON

("En esta noche clara")

Ĉi tiun helan nokton
kun miloj da steloj
mi kantos mian penson
temantan pri vi.

Atendante ke la luno
radios en ĉielo
la palan reflekson
de arĝenta bril¹.

Kaj en mia kor¹
estas vi
de l'animo mia la reĝin¹
ĉar naskiĝis mi
nur por vi
en eterna am¹ ne estas fin¹.

Ĉi tiun helan nokton
kun miloj da steloj
mi kantos mian penson
temantan pri vi.

Estu en balkon¹
amanta kor¹
kiam kantante mi pasos,
pensu virin¹
ke ankaŭ mi
revos ĉi nokte pri amo.

Por ke la viv¹
kunigu nin
rigardu la firmamenton
kaj ĉi tiel bela nokto
de nia amsono
estos la komenc¹.

LA SIPETO ORA ("La barca de ora")

Mi iros al
haven¹ kie troviĝas
ŝipeto ora kiu tuj nin disigos,
Mi iros ĵam
venis mi por la adiaŭo,
"Ĝis la", virin¹
"Ĝis la dum eterno, ĝis.

Neniam plu
rigardos vi miajn manojn,
viaj aŭdiloj ne plu
aŭdos miajn kantojn,
plenigos mi
ĉiujn marojn per miaj larmoj.

"Ĝis la", virin¹,
ĝis la dum eterno, ĝis....

Kiel oni jam scias, la venonta jaro estis proklamita (fare de UNESKO) "MONDA JARO DE KOMUNIKADO" kaj, kadre de tiu ĉi kunteksto, la Estraro de UEA decidis, ke la kongresa temo por 1983 estos: "SOCIAJ KAJ LINGVAJ ASPEKTOJ DE LA MODERNA KOMUNIKADO".

Ankaŭ la faka UEA organizo ILEF (Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-kino-magnetofon-amatoroj) intencas utiligi la sencon de la slogano por la temo de la konkursoj pri fotografaĵoj, kinoamatoraj filmoj kaj sonbendoj, kiuj havos la temon jenan: "LA FOLKLORA ARTO, PONTO INTER LA POPOLOJ".

Dum la Universala Kongreso de Esperanto, je la 29a de Julio 1982 ILEF okazigis sia jarkunveno. En tia jarkunveno estis elektita nia samideano JOSE FERNANDEZ ARROYO kiel respondeculo pri ILEF-aferoj en Okcidenta Eŭropo, Norda Ameriko kaj Latin-Amerika kontinento. Inter aliaj decidoj, la Prezidanto S-ro DONCO HITROV kaj la novelektita estraro, decidis kunvoki INTERNACIAJ FOTO KAJ KINO-KONKURSOJN dum la venonta U.K. en Budapeŝto 1983 laŭ la supren menciita temo. La fotografaĵoj por la Konkurso devos esti inter la bildformatoj 24x30 cm kaj 30x40 cm., nigra-blankaj aŭ koloraj. La filmoj estos Super-8 mmj., koloraj, sonaj aŭ mutaj, kaj ne pli ol 30 minutoj longaj. La limdato estos la 30a de Aprilo 1983. La konkursaĵoj estu senditaj al la menciita ILEF-respondeculo, S-ro F. Arroyo, antaŭ la limdato. Rilate al premioj kaj pliaj detaloj, ni baldaŭ denove informos. Momente, ni jam scias, ke estas premio starigita de la MADRIDA ESPERANTO LICEO.

BUDAPEŬTO INVITAS... Post 1929 kaj 1966, en 1983 la hungara ĉefurbo triafoje povos gastigi Universalan Kongreson. La Budapeŝtaj UK-oj ĝis nun ĉiam estis sukcesaj kunvenoj de la esperantistaro, kaj la Loka Kongresa Komitato esperas, ke okazos same ankaŭ pri la 68-a.

En la nuna mondo havas apartan signifon la intensa kaj senpera kunlaborado inter homoj vivantaj en malsamaj socisistemoj, ja tia kunlaborado, la reciproka ekkonado de la vidpunktoj kaj pensoj de aliaj homoj en internacia skalo, povas grave kontribui al la interpopola kompreniĝo kaj la monda paco. Hungario, malgranda lando kun lingvo apenaŭ konata trans la etnaj limoj, ĉiam montriĝis fekunda grundo por la celo de Esperanto-movado. La hungara socio ĉiam montris kaj montras seriozan intereson al la monda lingvo-problemo, kaj ne hazarde pluraj elstaraj figuroj de la Esperanta movado kaj kultura historio estis filoj de la hungara popolo.

El tio sekvas, ke la 68-a Universala Kongreso - same kiel antaŭ dek ses jaroj la 51-a UK - ĝuos vastan oficialan apogon ĉe la hungaraj aŭtoritatoj. Kaj tiu duobla subteno fare de la socio kaj la oficialaj instancoj donos idealan bazon por sukcesa kongresa laboro.

La Loka Kongresa Komitato elkore invitas ĉiujn esperantistojn al Budapeŝto por partopreni la 68-a Universala Kongreso de Esperanto!

D-ro Endre Baráth, parlamentano
Prezidanto de L.K.K.

INTERESA EKSPERIMENTO.- En "LA INFORMILO", informbulteno de la E-Federacio de Orienta Francio, ĉe la n^o 37, oni legas kuriozan informon, kiun mi sekve ekstraktos por vi: Profesoro Bruce Sherwood, esploranto pri la instruado pere de komputiloj, kuplis ordinatoron kun "sintezilo" ebla reprodukti 40 sonojn kun 4 diversaj niveloj de intenseco. Poste, Prof-ro Sherwood igis la maŝinon legi tekston redaktitan sinsekve en 8 lingvoj, inter kiuj, en Esperanto. Kia estis la rezulto? Ĉe la momento de la legado de la tekston, estis Esperanto kiu sukcesis: la "sintezilo" plej bone kaj perfekte reproduktis la esperantajn sonojn. La aliaj lingvoj prezentis gravajn problemojn de prononcado, kaŭze de la

Ni daŭrigas en tiu ĉi numero la "kosilojn pri stilo" elĉerpitajn el la libro de F. Faulhaber "NE TIEL, SED TIEL ĈI!", pensante, ke ili povas esti utilaj kaj klarigaj por tiuj kiuj deziras perfektigi sian esperantan stilon.

Deviga vortordo - La kutima vortordo estas: subjekto, predikato, komplemento(j), laŭ la ordinara irado de la pensoj, ekz.:

La patro skribas en la ĝardeno leteron al sia filo.

Estas dezirinde, ke ĉiu elemento de la frazo staru apud tiu, al kiu ĝi rilatas. Oni ne diru: La patro skribas leteron al sia filo en la ĝardeno, ĉar tia aranĝo estas miskompreniga: oni pensas ke la filo troviĝas en la ĝardeno.

Pro stilaj, nuancaj kaj akcentaj motivoj oni povas, ofte eĉ devas ŝanĝi tiun ordon, sed oni ĉiam zorgu, ke la rezultato havu la celitan sencon kaj ke la signifo ne ŝanĝiĝu.

Jen sekvas frazoj, kiuj pro la malĝusta loko de la vortoj ricevis alian signifon ol tiun, kiun celis la aŭtoro de la originalo. En kolono A ni donas post ĉiu frazo inter krampoj la nedezirintan - signifon.

En kolono B la frazon korektitan laŭ la senco de la originalo.

A - **Ne tiel....**

B - ... sed tiel ĉi.

1. La najbaroj ne sin okupu pri la vizito. (Do: ili okupu aliajn persosonojn pri la vizito; ne sin.) La najbaro ne okupu sin pro la vizito.

2. Tia solvo tamen ne al ŝi malplaĉis. (Do, al kiu malplaĉis tia ŝi. solvo, se ne al ŝi?) Tia solvo tamen ne malplacis al ŝi.

3. Ne ŝin ĝenu, patro! (Do, kiun la patro ĝenu?) Ne ĝenu ŝin, patro!

4. Ne tion forgesu! (Do forgesu ion alian, ne tion!) Ne forgesu tion!

5. Ni ne pri tio silentu! (Do pri aliaj aferoj ni silentu, ne pri tio) Ni ne silentu pri tio!

6. Vi ne tion faru! (Do, kion mi faru?) Vi ne faru tion!

Nun certe ne estas malfacile al vi, mem klarigi kial en la sekvan-taj frazoj en kolono A la vortoj "almenaŭ", "ankoraŭ", "jam", "eĉ" "nur" kaj aliaj ne staras sur la ĝusta loko, se la tradukinto volis redoni la signifon en kolono B.:

Almenaŭ mi bezonas tri horojn. Mi bezonas almenaŭ tri horojn

Mi nur havas dudek jarojn. Mi havas nur dudek jarojn.

Dum la transflugado li nur atentis sian maŝinon kaj sian kompason. Dum la transflugado li atentis nur siajn maŝinon kaj kompason.

Oni nur al mi komisiis konduki ŝin tien. Oni komisiis al mi nur konduki ŝin tien.

Nur varbu sanajn laboristojn. Varbu nur sanajn laboristojn.

En Londono oni jam lin konsideris strangulo. Jam en Londono oni lin konsideris strangulo.

Neniu eĉ lin vidis eksterdome. Eĉ neniu vidis lin eksterdome.

Rememoru nur, kion la ebria G. preskaŭ al ŝi faris. Rememoru nur, kion la ebria G. preskaŭ faris al ŝi.

Je la oka ĉiuj membroj preskaŭ ĉeestis. * Je la oka preskaŭ ĉiuj membroj ĉeestis.

Antaŭe mi devas ion diri al vi. Mi devas antaŭe diri ion al vi.

INTERNA IDEO, MOVADO, NUR LINGVO

De antaŭ multaj jaroj estas jam tia disputo inter la esperantistaro. Tamen, pro tio ke ĝi estas malnova estas ankaŭ ĉiam aktuala. La homoj ŝanĝiĝas sed la ideoj restas, kaj de tempo al tempo de nove la problemo aperas ĉie aŭ tie.

Ĉu la internacia lingvo Esperanto devus esti konsiderata **nur** kiel lingvo inter la aliaj kaj sole tiusence devus ĝi esti lernata kaj uzata? Ĉu ĝi devus enteni "ion pli" ebla kunligi la homoj per komuna, spirita sento? Ĉu la disvastigado, la diskonigado de tia internacia lingvo bezonus esti entreprenita kiel kolektiva tasko, kiel misiista movado celante alporti al la tuta homaro iun senduban bonon? Ĉiu nova esperantisto, frue aŭ malfrue, alfrontas tiun diskuton. Kompreneble, la definitiva, la ĉiukontentiga solvo estos malfacile trovebla. Tamen, eble ĝi estas en la supozita kvanto de akordo, kion funde havas ĉiu diskutanto.

Laŭ mi, konsideri Esperanton kiel "internacia lingvo" jam kumportas iun specialan signifon, nome pro la fakto, ke ĝi ankoraŭ ne estas **vere** internacia (t.e., plene disvastigita internacie), sed ni **sentas** kaj **deziras**, ke ĝi estu. Kiam ni konsentas nian akordon al ia kaŭzo spirita, bonfaranta, kiu celas iamaniere la bonon por la homaro, ni ja partoprenas ĝian "internan ideon". Ĉiu ideala teorio kunportas ĝian internan ideon, aŭ metafore dirite, ĝian **mistikon**. Kaj estas por mi malfacile kompreni la ideon de E-o kiel internacia komunikilo por la komuna interkompreno de la homoj, sen akcepti kun ĝi la misian idealon, kiun ĝia disvastigado enhavas. Laŭ mi, nur estas superaj idealoj tiuj, kiuj celas superajn aspirojn. E-o estas do unu el tiuj, kaj pro tio bezonas ne nur **kredantojn**, sed ankaŭ **agantojn**. Superaj, spiritaj idealoj bezonas superajn kaj spiritajn homojn. Ne estas facila tasko realigi "utopiojn": tio postulas grandan fidon kaj agon. Pensi, ke E-o povas ja esti **vera** lingvo internacia, estas jam fido, estas jam akcepti (kvankam nevole) la "internan ideon". Peni por lerni, diskonigi, disvastigi, propagandi la lingvon, tio estas la agon, la "movado"

Konsideri E-o **nur** kiel lingvo inter la aliaj, ŝajnas al mi tro simpla kaj eble ne tro utila sinteno. Povas esti ion simila ol kredi je Dio, sen tute kompreni tion, kion Dio signifas. Ĉar E-o ne estas nur unu inter la aliaj lingvoj, sed ĝi naskiĝis por esti la lingvo internacia kaj ĝi ne estos tiel se oni ne laboras kaj penadas pro ĝia internacieco. Utiligi E-on sole kiel profitdona ilo, ŝajnas mizara, egoisma uzado de nobla idealo, kvankam ĝi estas, kompreneble, tute libera kaj legitima rajto.

Do, kion konkludi? Eltiranta la plej eklektikan konkludon, mi dirus, ke E-o bezonas la tri antaŭajn konceptojn: kune la tri, bone miksitaj, povus esti la plej taŭga metodo por efike realigila disvastigado de la internacia lingvo. Firme kaj sincere akcepti la internan ideon, la mistikon, la idealon, la mistikon de la idealon (la Historio montras kiel la idealoj movis la grandajn revoluciojn). Daŭre kaj konstante partopreni la laboron, la malfacilan taskon, la entuziasman "movadon", kiu celas la disvastigadon, la internaciecon de nia lingvo. Kaj ankaŭ - kial ne? - utiligi la lingvon nur kiel lingvo, same kiel unu inter la aliaj, tiel taŭga, tiel bona, tiel bela (kaj eĉ pli!) kiel la aliaj.

Tia estas la vojo. Nur tiamaniere, kiel diris Zamenhof, ni "atingos la celon en gloro".

José F. Arroyo

lia ĉambro havas du fenestrojn. Unu el ili rigardas al fruktoĝardeno, intima paradizo, kie miaj revoj sonĝas sub figarbo, ĉe kvietiga baseno, inter hederfolioj, rampantaj elen sur kotmuro. La alia frontas kontraŭ strato, vulgara urbega strateto, de kie supreniras ĝis miaj sensoj la ĉiutagan iro-reveno de homoj kaj eventoj.

Noktigis. Somera nokto, grila nokto, tiel densa, ke oni povus maĉi la nokterojn ĉe la plej sensignifa lipmovo emanta al kiso, al tuŝeto, al la simpla avorto. Nokto de ĉirpado kaj senkomplikaj parfumoj ĉirkaŭ mia vizaĝo, trans mia fenestro.

La ĝardeno aperas superĉutita de lunarĝento. Muzikas la cikadoj. Du lampiroj amoras en ĉarna, preskaŭ dia pleneco.

Harmonio en mia koro. Fafas sin for de ĝi karessagoj, celantaj la animon mem de aĵoj kaj bestetoj, kun tiel nebridebla pasio al la unuigo kun mia kosmo, ke jam ĉio restas penetrata de mia memo kaj tiel, kvazaŭ rebartitaj, ili per mi rekonas sin amindaj en la folioj de la figarbo, en ĉiu rosguto, en ĉiu palpebrumo de steloj kaptitaj enbasene... kaj amas sin reciproke, nome sin mem, ĉar ili per mi estas jam unu sola io, unu ama tutajo.

La nokto venkis morton kaj doloron.

Mi ekbruliĝas cigaredon. La fumo ŝvebas trankvila super mia kapo. Ĉirkaŭ mi-komplekso da nebuloj, libroj, ĵurnaloj en konvena misordo, la tiktado de mia horloĝo, miaj rememoroj diso en la hejmeca atmosfero. Mi endormiĝas sur brakseĝo.

Bruo, bruego regas en la strato. Terurite mi vekigis, kuras al la fenestro kaj montras min ĉe ĝi. Miaj krioj flugas ien, kie la sango metas misflorojn sur homan kapon. La tuta universo renversiĝas pro honto. La vivo estas tretita sur strate. La plorĝemoj, ho, la plorĝemoj kornevigaj cirkle forveturas al la regno de la ielajneco, perdante sin inter mortigaj maŝinoj kaj belaj prelegoj pri la homa paco.

Infano kunportas mitraleton. Infano el Afriko, el Azio. Infano, kiu neniam konis iam alian ludon krom milito kaj detruo. Sed li ne scias ke la morto venas kardojn sur la lipoj. Li ne imagas, ke la stellumo malmoligas la neelverŝitajn larmojn de la okuloj malfermitaj. Li rigardas min mirigite, neniel komprenante mian angoran mienon kaj, konvinkite, ke li havas antaŭ si danĝeran neŭropaton, li ŝoviĝadas antaŭen inter la homamaso kaj malaperas ien ajn, kie kugloj, grenadoj kaj brulbomboj krie rakontos al la mortrikanajn fabelojn pri malamo. Sed la poetoj dispedigos la mensogen per la sola forto de la parolo.

La fruktoĝardeno havas cidoniujon kaj prunarbo.

Printempokte la najbaroj, sidante sub ili, mallaŭte flustras preskaŭ dormigajn zumojn, kiuj, kune kun la lornicera raviteco, retenas la spiradon ĝis la linoj de la senza nuligo pro superega ĝuo. Tie mi restas du, tri horojn, mil jarojn en plezuriga kvieteco.

Foje, rimarkinte mian ĉefenestran aleston, ili venas al mi kunportante pladon da diversaj freŝaj fruktoj, kiun mi metas sur tablon por plilongigi en mian ĉambron la elspiraĵon de la edena ĝardeno.

Ni parolas pri..., sed, ho, ne ni parolas. Estas la nokto mastrino de ĉiu vortero suriĝanta sur nian langon.

Poste, ĉar la dormo venkas ilin kaj la basena venteto hirtigas haŭton kaj foliojn, ili nepercepteble foriĝas, lasante molajn ĝisojn en la aero plenplena de kolombumoj.

La lunradioj flirtas sur la figarbo, sur la herbaro, sur la supraĵo de la baseno, sur mia vizaĝo kaj mi ne evitas ilin, sed mi prenas faskon da radieroj inter miaj manoj, ilin tiklas kareseme, kaj ne povante elteni plu, ili elŝiras sin for, ridetante infane en la deziro rekomenci la ludon, kaj tiel, fordonitaj al ĉi tiu amema, preskaŭ volupta petolado, surprizas min la unuaj helecoj de la matenruĝo. Tiam la steloj fuĝas en mian buŝon por ornami mian sonĝan universon.

Plendoj, ĝemoj, krioj surstrate. Mia alia fenestro.

Infano mortas pro malsato apud luksa aŭtomobilo. Soldatoj pretigas sin por ajna milito ien en la mondo, kaj misiloj - mis-iloj - pasas sub miaj teruritaj okuloj dum du goriloj surpodie bombastas la defendon de la homa indeco. Indeco de senlaborula almozetanto ĉeangule. Indeco de senhejmuloj, dormantaj sur metroaj benkoj. Indeco de enkarcerigitaj senkulpujoj iam konceptintaj pacnoktojn kaj amnoktojn tiajn, kiajn oni anĝele kantas ĉiukristnaske ĉe la sojlo de kontraŭatomaj remparoj, ŝirmantaj nur kelkajn difinitajn indulojn.

(tio estas, ĉiu lingvo-sistemo -longe- reprezentas diversan ĝeneralan pensmanieron); ĉiu parolanto personstile uzas la lingvon - parole - havante pro tio partikularan pensstrukturon.

Vi povas al tio respondi: la diferenta maniero pensi kaŭziĝas pro la malproksimeco inter la kulturoj. Do ne temas pri lingvoj. Jes, certe, tiu aserto, laŭ mi, estas prava. Sed tio povis okazi tiel nur en praa komenco. Jes, la pensmanieron kreas la lingvo sed evidente la lingvo internigas niammensen kaj influas nian manieron pensi. Denove nia penso influas per la uzado la lingvon kiu socie evoluas. Do temas pri dinamika proceso kiu dialektike resumas la rilaton inter ulo kaj lingvo.

Malsimile paroli, malsimile pensi povas signifi malsimile opinii. Ekzistas la ebleco, ke du personoj konsiderus evidentaj du kontraŭaj aĵoj. La opinio de ĉiu devenas el malsimila pensmaniero, do neniam ni povas diri, ke iu el ili havas certe la veron.

Lingvo estas grava ankaŭ en la socia vivo. Mi citos nur kelkajn elstarajn aspektojn de ĝia rolo en la homaro.

Unue lingvo estas ilo per kiu la infano sociiĝas kaj sin adaptas al kunvivado. La infano lernas regulojn, rolojn kaj eĉ manieron vidi la mondon. Per la lingvo li lernas la moralon kaj aliajn gravajn aspektojn de la grupo. Ĉar ĝi apartenas al socia klaso, ĝi lernas ankaŭ la manieron paroli de siaj samklasanoj. Infanoj loĝantaj en malriĉaj kvartaloj havas pliajn intelektajn malfacilaĵojn ol la ceteraj lerni kiun ajn subjekton, inter aliaj kaŭzoj, ne ĉar ili estas malpli inteligentaj, sed ĉar iliaj ne ellaboritaj parolmanieroj mallertigas ilin en la lernado. Tuj kiam ili plibonigas siajn lingvonivelon ili akiras eblecon grandigi siajn intelektajn horizontojn.

Ĉiu klaso do havas specifan parolmanieron, sed eĉ ĉiu profesio devigas la uzadon de ĵargono. Scienculoj, ĉarpentristoj, soldatoj, filozofoj, uzas ĵargonon tute nekompreneblan por la nemembroj de la profesio. Tio devigas ĉiun homon elekti, ĉu libere, ĉu perforte, profesion rolon kies posta ŝanĝo malfacilas. Iom post iom la studentoj estas pli specifaj kaj nepre malpli kompreneblaj de la neiniciatintoj.

La koncepto kiun mi antaŭe priskribis evoluiĝis dum jarcentoj al ĝenerala teorio kiu en sociolingvistiko nomiĝas "Hipotezo Sapir-Whorf". Ĉi tiu teorio havas originon en la kantianaj filozofioj interesitaj pri la kono-problemo. Certe ni povas elstarigi du aŭtorojn: Herder kaj Von Humbold. Herder estas la unua kiu akceptis la teorion, ke la gepatra lingvo influas nian konon de la mondo. La lingvo konvertiĝas en kulturilon de nacio, de popolo. Ĝi estas la pensstrukturo de la individuoj. La lingvo, kiel strukturformiganto de la penso, limigas ĝin certgrade. Resume per liaj propraj vortoj: "Ĉiu popolo parolas laŭ siaj ideoj kaj pensas per sia lingvo".

Simile sed plej profunde asertas Von Humbold, ke la diversecoj inter la lingvoj ne estas nur somalsimilecoj. Tiuj diferencoj ne konsistas je klasifiki malsimile la saman objektaron. Ĝi estas proceso plej komplika: Ĝi estas nomi alimaniere. La vera funkcio de la lingvo estas formigi imagojn el la realeco. Popolo kaj lingvo nepre ligiĝas, kiel li mem diras: "La kulturo kaj lingvo de popolo troviĝas tiel intime ligitaj, ke, per unu el ili, eblas koni la alian. La lingvo estas la ekstera fenomeno de la popolspirito. La lingvo estas ĝia spirito kaj la spirito ĝia lingvo. Neniam ni povos ilin kunigi sufiĉe". Sed fine ni aliru la hipotezon Sapir-Whorf. Por Sapir, same kiel por Von Humbold, la lingvo influas la "socian realecon". Tamen Sapir ne parolas pri "popolspirito" sed pri sociaĵo. Per Sapir la teorioj de Von Humbold perdas mistikecon kaj scienco eniras tiun ĉi kampon.

Ni rezume povas priskribi la hipotezon per du asertoj:

- la lingvo, kiel socia produktaĵo, strukturigas nian manieron koni la mondon.
- la lingvaj sistemoj estas rezultoj de la medio. Homoj pensantaj per lingvoj sociigitaj en malsimilaj medioj konas malsimile.

Whorf sin okupas pri la scienca pruvo de la hipotezo kiu, kvankam ĝenerale evidenta, ne havas facilan demonstron.

La lasta punkto kiu fine permesos al mi konkludi la neceson de Esperanto estas la problemoj kaŭzitaj de la socia graveco de la lingvo. Lingvo estas iamaniere povo. Ĝi estas tre akra amilo konstante uzita en la socia kontrolo. La historio realigis la faman frazon de Hejlsler: "Kiu deziras esti diktatoro utile agos lernante semantikon". Tamen semantiko utilas ankaŭ kiel luktilo kontraŭ la antaŭe nomita lingvopovo. Kiu ju pli bone konas la "nuancojn" de la lingvo plej efike kapablas sin defendi de la "ĉarmo" de la sloganoj kaj analizi la normale nesignifan ĵuran kaj politikan parolmanieron.

Pro tio multe gravas profunde koni nian lingvon. Homo ne estas homo sen lingvo. Ĉiuj kapablecoj akordiĝas ĝenerale en la lingvonivelo. Tion jam klare esprimis Tegner en jena teksto: "Kion vi ne kapablas klare diri, vi ne scias. Per la penso naskiĝis la vortoj en la lipoj de la homo: kio malklare estis dirita, malklare estis pensita".

Tamen uzi ununuran lingvon povas esti decida faktoro kiu igos nin etnocentristaj. Koni profunde nian propran lingvon kaj forgesi la ekziston de la ceteraj malgrandigas nian horizonton. Ni rajtas kaj devas koni aliajn lingvojn ĉar per ili ni konas fremdajn kulturojn, fremdajn opiniojn. Ni lernas tiel respekti aliajn manierojn pensi.

Sed ni devas atenti ĉar lerni lingvon nekritike, aŭ akcepti ĝin nin cirkaŭi en nia socio estas akcepti anstataŭanton de nia propra kulturo. Ekonomiaj kaj politikaj interesoj kaŝiĝas en tiuj aferoj. Pro tio nepras neŭtrale solvi la problemon.

La intima rilato inter lingvo kaj kulturo donas la eblecon al ni observi kiel multfoje civilizoj klopodas invadi sociojn per la lingvo. Lingvo reprezentas ideologion kaj imperialismon. Tiu kultura invado sukcesas kiam ĝi atingas la malaperon de la origina pensmaniero de tiu popolo.


Ĉio ĉi certe starigas finan demandon. Kiel solvi la problemon kontentige per ĉiuj?. Longa kaj superflua estos klarigado pri neceso de lingvo internacia. Sed tiu lingvo neniam devas esti nacia ĉar mi estus malsukcesinta se mi antaŭe ne klare montris, ke akcepti nacian lingvon signifas ankaŭ akcepti ĝian kulturon. Nur artifaritaj lingvoj havas eblecon solvi la problemon.

Sed multaj artifaritaj lingvoj aperis dum la homa historio. Kial do Esperanto? Nia Internacia Lingvo estas la sola kiu sin organizis en movado kaj komencis eksteran propagandon. Esperanto ne restis kiel interna afero. Eĉ ĝi havas specialan senton, kiu ne estas ideologio, kaj direktis la ĝia agadon ne nur al la solvo de la lingvaj problemoj sed ankaŭ al la ĝenerala respekto de la homaj rajtoj. Deziri egalecon inter la popoloj, lingvan egalecon, devigas nin deziri la feliĉon de ĉiuj homoj.

Kaj ĉio ĉi ŝuldiĝas nur al sola homo, Zamenhof. Ni povas akuzi lin kaj la primitivan esperantistaron pri mistikeco, sed tio estus maljusta ĉar ni devas konsideri la epokon kaj situacion. Kontraŭe ni devas danki al Zamenhof la homecigon de la lingvo kaj la senton pri espero. Multaj konsideras tiun esperon navian, sed laŭ mi, ĝi enhavas ecojn revoluciajn, ĉar la nura sistemo atingi nian celon estas neniam malesperi kaj konstante lukti kvankan ni ne ricevos rezultojn.

Zamenhof alie permesis la liberan disvolviĝon de Esperanto kaj donis demokratikan ekzemplon. Li neniam perforte akceptigis siajn opiniojn. Tio estis, laŭ mi, kio permesis, ke Esperanto ankoraŭ restu viva kaj estos serioza ebleco por la solvo de la internacia lingva problemo.

Miguel Angel Sancho



PREĜO SUB LA VERDA STANDARDO

Al vi, ho potenca senkorpa mistero,
Fortego, la mondon reganta,
Al vi, granda fonto de l'amo kaj vero
Kaj fonto de vivo konstanta
Al vi, kiun ĉiun malsane prezentas
Sed ĉiuj egale en koro nin sentas
Al vi, kiu kreskas, al vi kiu regas
Hodiaŭ ni preĝas.

Al vi ni ne venas kun kredo nacia
Kun dogmoj de blinda fervoro
Silentas nun ĉiu disput' religia
Kaj regas nur kredo de koro.
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,
Ni staras nun, filoj de l'tuta homaro
Ĉe via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele
Sed ĝi sin dividis batala
Popolo popolon atakas kruele
Frat' fraton atakas ŝakale.
Ho, kiu ajn estas vi, forto mistera
Aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera
Redonu la pacon al la infanaro
De l' granda homaro.

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali
Por reunuigi l' homaron.
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali
Sed lasu nin venki la baron.
Donacu Vi benon al nia laboro,
Donacu Vi forton al nia fervoro,
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj
Nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos
Ĝi signas la bonon kaj belon,
La Forto mistera de l'mondo nin benos
Kaj nian atingos ni celon
Ni inter popoloj la muroj detruos
Kaj ili ekrakos kaj ili ekbruos
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero
Ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj...
Antaŭen kun pacaj armiloj.
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj,
Ni ĉiuj de Di' estas filoj.
Ni ĉiam memoru pri bon'de l'homaro
Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj
staro
Al frata la celo ni iru obstine
Antaŭen senfine.

LA AMO

La am' ne estas ludo,
Sed forta sorta trudo,
Ĝi svingas sian vipon
Al lip' pelante lipon.

Ni timas ĝian baton,
Kapricon, senkompaton,
Sub ĝia jug' ni svenas,
Sed tamen ĝin ni benas.

EN SOLO

Ĉu en ĉambreto, dum vespersilento,
Aŭ ĉu en la tumulto de l'popol',
Subite ne atakis vin la sento
Ke estas vi en sol', en surda sol'?

Ke via kor', turmente pro senpovo
Frapadas sur la ŝton' de via sin',
Kiel sub tero, post la katastrofo,
Ministo en la enfalita min'.

Kormilionoj sub la sama fato
Baraktas, signas per obtuza bat'.
La am', la am', jen estas tia bato,
Kaj tia bato estas la kompat'.

Potencaj batoj sonas, sed svene,
Senforte mordas sub la surda ter',
Kaj tamen ĉiam sonas batoj pene,
Jen kun espero, kaj jen sen esper'.

Ho, se alvenus sopirata savo,
Kiu la koroj portus al la lum':
En ĝoj' ebria, en eterna ravo
Nin en dancingon fandus fratbrakum'!

Espero trompa! Tiu sav' ne venas,
Profunde kuŝas enfalinta min'.
La kor' fermita malespere penas,
Vane frapante sur la mur' de sin'.

KISOJ

Mi kisas vian manon:
Patrino kisas fil'...
Estim'. Respekto pia.
Humil'.
Jen kis' al viaj haroj:
De patr' al filinet'...
Dorlot'. Fier' naiva.
Kviet'.

Mi kisas vian frunton:
Fratinon kisas frat'....
Fidela ŝirm'. Kareso.
Kaj flat'.

VIVO DE NIA LICEO

- La pasintan 10-an januaro vizitis nian Liceon la famkonata bulgara operokantisto samideano S-ro Veselin Damjanov, kiu vojaĝas tra kelkaj urboj de Hispanio kaj okcident-eŭropo. Li regalis nin, liceanoj kaj gelernantoj, kun mirinda, neforgesebla koncerto. Sin akompanante per akordiono, li kantis kelkajn operariojn kaj popolkanzonojn en esperanto. La voĉo de S-ro Damjanov, belega kaj pova, plenumis la salonon de nia sideĵo kaj emocie skuis la korojn de la ĉeestantoj. Li ricevis tre longan kaj varman aplaŭdon. Post la memorebla koncerto, nia vizitanto, akompanata de multnombra grupo liceanoj vizitis kelkajn tipajn madridajn trinkejojn kaj, dum tia nokta promenado, li gustumis la tipan "montara ŝinko" en la "Sinko Muzeo" kune kun aliajn tipajn pladojn kaj tipajn vinojn kaj multe ĝuis la simpatian etoson de la madrida "nokta vivo". La sekvantaj tagoj de lia restado en Madrido, krome la normala turisma vizitado de la urbo, li ĉeestis du spektaklojn, kiuj profunde impresis al li: la "Antologio de Zarzuela" kaj "flamenka tablao". Ekde la paĝoj de nia revuo, ni deziras kore kaj sincere danki al tiu granda artisto pro la plezuro de lia voĉo, liaj kanzonoj kaj lia vizito.
- La 26-an januaro prelegis en nia centro la uruguaya samideano S-ro Alberto Barrocas pri turismaj, kulturaj kaj folkloraj aspektoj de sia lando. La prelego, ilustrita per belaj lumbildoj, estis ege aplaŭdita de la ĉeestantoj.
- Ankaŭ la sama tago, 26-an januaro, la madrida esperantisto S-ro José Navarro, prelegis en la Liceo pri sia laboro kaj esploroj en la kampo de la "aŭtomata tradukado" uzante Esperanto kiel pontolingvo. S-ro Navarro, sperta fakulo pri informatiko, laboras jam dum sep jaroj en tiu ĉi interesa kampo kaj jam atingis gravajn progresojn en siaj esploroj. Li daŭrigis sian prelegon la sekvantan merkredon, 2-an februaro. Ni tutkore gratulas kaj kuraĝigas nian samideanon daŭrigi liajn strebojn en tiu ĉi gravega kampo por nia internacia lingvo.
- La tuta estraro kaj membroj de nia M.E.L. sincere kondolencas nian samideanon, poetino Adelaida Los Santos, pri la dolora forpaso de ŝia edzo, la konata hispana poeto Guillermo Osorio. Tiu poeto havas kelkajn librojn eldonitajn kaj ĝuste la lastan aperigitan ("La blua hundo", mallongaj rakontoj) tradukas al esperanto nia liceano Miguel Fernandez.

NIA LICEA BIBLIOTEKO

Post tri monata laboro, la biblioteko de la Liceo estas jam fine ordonita. Grupo da liceanoj registris la 680 librojn, ordonis revuojn, reviziis pape-rojn kaj grupigis fotografajojn, kongresajn dokumentojn, ktp.

La libroj estas nun registritaj laŭ la jenaj konitaĵoj: orda numero, titolo, aŭtoro, temo, eldonejo kaj dato. Estas disponebla liston en kiu ili aperas listitaj laŭ orda numero kaj temo. La pruntedonado oni faras lundo kaj merkredo.

Revuoj.-- Oni faris kolektojn laŭ titoloj kaj la ripetitaj numeroj estas disdonataj al aliaj esperantaj grupoj.

Diversmaterialo.-- Estas grupitaj laŭ klaso: poŝtmarkoj, kongresoj, E-o kursoj, ĵurnal-eltranĉaĵoj, ktp.

Ni esperas, ke la biblioteko bone funkcios estonte kaj la diversmaterialoj arĥivitaj servos por esperanta studo, eksposicioj. k.c.

VOJAĜO AL BUDAPEŝTA U.K.

La Liceo intencas organizi karavanon al la Universala Kongreso ĉe Budapeŝto kaj oni atendas la finan prezon speciale aranĝita de hungara vojaĝagentejo por la madrida grupo. Ŝajnas ke la prezo estos tre konvena kaj la vojaĝo entenos ir-revenon aviadile kaj unu semajnonen hotelo kun matenmanĝo. Ĉiu interesuloj, bonvolu kontakti kun LUPE kaj aliĝu kiel eble plej baldaŭ.

KELKAJ KONSILOJ PRI STILO

Ni daŭrigas en tiu ĉi numero la "konsilojn pri stilo" elĉerpitajn el la libro de F. Faulhaber "NE TIEL, SED TIEL ĈI!", pensante, ke ili povas esti utilaj kaj klarigaj por tiuj, kiuj deziras perfektigi sian esperantan stilon.

Ŝanĝo de vortordo

La libero ŝanĝi la kutiman vortordon estas uzata por reliefigi aŭ akcentigi iun vorton aŭ frazparton kaj tiel nuancon en la signifo de la frazo. La nuda fakto, kiun la frazo esprimas, ne ŝanĝiĝas per tio, sed aperas sub alia lumo, ekz. se mi volas demandi iun, ĉu li faris tion, kion mi komisiis al li, mi diras: "Ĉu vi faris tion?" Se mi volas demandi, ĉu li aŭ iu alia faris tion, mi diras: "Ĉu vi faris tion?" aŭ "Ĉu faris tion vi?" En la unua frazo mi devas akcenti vi. Tio ne estas necesa en la dua frazo, ĉar ni ŝovis la subjekton malantaŭen, do sur nekutiman lokon, kie la akcento per si mem falas sur vi. - En "vivo de Zamenhof" de Privat, ni trovas multajn ekzemplojn de nekutima vortordo, el kiuj ni citas la jenajn:

1. Gloras generaloj, bruas tamburoj, sonas muzikoj.
2. Pli simpla, pli taŭga por uzado nuna devus esti la revita lingvo.
3. Nemultaj estas la lernantoj kaj neriĉa la paro.
4. De la patrino la koro, de la patro la cerbo, de la loko la impresoj; jen la tri elementoj en la formado de la Zamenhova genio.
5. Pri laboristoj, pri malriĉaj homoj penantaj la tutan tagon, gimnazio Zamenhof pensadis pli kaj pli.
6. Vivantajn vortojn lingvo devas havi, sed ĝi celas vivi mem.

En ĉituj frazoj ĉiu ŝanĝo de la kutima vortordo estas pravigebla en la stilo de ĉi tiu verko. Ne kaprice la aŭtoro aranĝis la vortojn alie! Li celis ion per tio: donante al certa vorto alian lokon ol la kutiman, li reliefigis aŭ akcentis ĝin. Tiel la frazo ricevis ian viglecon kaj koloron, kiu plene konvenas al la temo, kaj kiuj ĉe normala vortordo mankas.

Legu en "Vivo de Zamenhof" la cititajn frazojn en la kunteksto kaj poste aranĝu ilin laŭ la normala vortordo: tiam vi rimarkos, ke la ĉarmo, la aparta impresoj, la reliefo, la akcento, la nuanco estas malaperintaj. La frazoj tiam impresas tro malvarme, afere, sobre, kvankan ilia fakta signifo ne ŝanĝiĝis. Ekzistas diversaj kaŭzoj, kial vortordo alia ol la kutima estas preferinda. Tial "Plena Gramatiko" avertas, ke "oni ne faru ŝanĝon senkaŭze, ĉar nur tiam maniere oni povas atingi, ke la ŝanĝo signifas ion, ke oni eksentu el ĝi certan nuancon: la akcentadon de iu frazelemento".

Senkaŭza ŝanĝado enhavas la danĝeron, ke oni diros ion alian, ol kion oni volis diri.

4. BONA STILO ESTAS SIMPLA

Por atingi klarecon oni aranĝu siajn frazojn en logika sinsekvo kaj evitu ĉirkaŭvojojn, detalecon kaj senutilan balaston. Sed aliflanke oni evitu ankaŭ troan koncizon, kiu ofte starigas la leganton antaŭ enigmojn. Klarigu tion kelkaj ekzemploj:

La kunmetaĵoj: vaporŝipo, abonpago, rapidvagonaro, bonkora, scivola, altranga, bondezeroj, voĉdoni, piediri estas jam komune uzataj kaj pro tio tute klaraj. Sed legante la vorton diadoro ni haltas: ĝi ŝajnas neologismo, sed vane ni serĉas ĝin en Plena Vortaro. El la enhavo de la verko, en kiu ni trovis ĝin, evidentiĝis, ke ĝi estas vorto kunmetita el di kaj adorno = adoro al dio. Sed skribante di-adoro aŭ adoro al dio ni faras la vorto tuj travidebla. La vorto mesmistero estas same malklara. Laŭ la verko portanta tiun titolon, ni komprenis, ke ĝi signifas mistero de la meso. La traduko mistero de la meso estas pli klara kaj pli belsona. Ĉe eventuala ripeto povas sufiĉi mes-mistero aŭ mesmistero, ĉar tiam la ideo estas al la leganto jam konata.